der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

21. Jahrgang Nr. 133 (5/1985) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Georgi Korotkievič

Tio okazis en la neforgesebla 1945

En aŭtuno de estinta jaro trapasis en Moskvo kaj en aliaj urboj de Sovetio „Tagoj de kulturo de GDR". Unu fojon dum tiuj tagoj oni vokis nin — estintajn oficirojn de Soveta Armeo, kiuj laboris en Sovetia milita administracio en Germanio (SMAG) veni en la Sovetan Komitaton de militaj veteranoj por renkontiĝo kun delegitaro de kulturaj agantoj de GDR, kies gvidanto estis la ministro de kulturo Hoffmann.

Pli ol du horojn ni sidis — gastoj kaj gastigantoj — ĉe tablo, trinkis kafon kaj rememoris, kiel laboris post la fino de milito sur liberigita el faŝisma jugo tero sovetiaj oficiroj, kiujn oni nomis „Kultur- und Bildungsoffiziere" („oficiroj pri kulturaj kaj klerecaj aferoj"). Nomante ilin tiel neniu supozis, ke tiu titolo restos al ili por la tuta vivo (nur kun aldono de vorto „estinta"). En la memoro restis la varmaj vortoj de la ministro Hoffmann, kiu interalie diris al ni:

— Vi, sovetiaj oficiroj ne nur fizike frakasis la faŝismon tiam, en 1945a, sed vi montris al ni la plej bonan formon de socio, de rilatoj inter homoj, vian moralon. Vi portis al ni kulturon kaj literaturon, jes — sovetian kaj ankaŭ germanan literaturon (por ekzemplo — novan komprenon de Heine „Neues Heine-Verständnis"). Dum tiu konversacio en la Komitato de militaj veteranoj, membroj de la delegitaro petis nin, la estintajn oficirojn de SMAG, skribi rememorojn pri tiu tempo, kiun oni simbole nomu Matenon post la Venko.

La plej proksima al mi sfero de kultura agado estas literaturo kaj mi, kompreneble, volis ion rememon pri tiu parto de laboro de „kulturaj oficiroj", pri kiu diris Hoffmann. Kelkfoje mi provis komenci ion priskribi, sed ĉiam haltiĝis — mi ne sciis, kiel mi devus elekti el la kalejdoskopo de epizodoj kaj faktoj, kiujn mi ankoraŭ tenas en memoro. Kaj unufoje, tute ne atendante, aperis če mi vera sufloro, kiu okazis per Moskva Radio. Vere mi enŝaltis la riavilon kaj ekaŭdis voĉon de radioparolisto: „Atentu! Aŭskultu nian vican dissendon „Teatro ĉe mikrofono". Ĝi estas hodiaŭ dediĉita al la popola artisto de Soveta Unio Miĥail Astangov".

Ho, volonte mi aŭskultos ĝin kaj jam ekscias, pri kio mi devas komence rememori kaj priskribi.

Ni, maljunaj moskvanoj-teatroamantoj, bone konis kaj ofte kun danko rememoras tiun talentplenan aktoron de la Moskva drama teatro, kiu portas la nomon de sia fondinto Jevgenij Vaĥtangov. Multfoje ni vizitis spektaklojn, en kiuj estis okupita Miĥail Astangov en ĉefaj roloj. Kaj nun mi denove aŭdas la konatan voĉon de la ŝatata aktoro (malnovaj sonregistroj konservis ĝin). Moskva Radio transdonas fragmentojn el la plej eminentaj kaj

bonaj spektakloj. Kaj nun — fragmentoj el la spektaklo „Antaŭ sunsubiro" („Vor Sonnenuntergang"), laŭ la dramo de Gerhart Hauptmann. . . . Sekreta konsilanto Matthias Clausen, kies rolon ludas Miĥail Astangov, mirinde sincere, ĉaste diras al Inken, simpla virino el la amaso de laborema popolo, pri lia alta amo. Poste komenciĝas konflikto inter Mathias Klausen kaj membroj de ŝia familio — finfine ili fariĝas ekzekutisto de ilia patro. Kia koleregо kaj maldolĉeco sonas en la vortoj de Matthias Clausen, direktitaj al Klamrot, provinca negoculo, en kiu oni facile trarigardas trajtojn de naziisto.

Ni, moskvanoj, bone rememoras tiun spektaklon de la Vaĥtangov-teatro kun Astangov en la ĉefa rolo. Tio okazis dum la somero 1941a. Jam komenciĝis la milito. Sur la larĝa fronto — de Barenca ĝis Nigra maroj — sovetiaj trupoj batalis kontraŭ ofenzivemaj germanaj trupoj. Kaj en la sama tempo sur la scenejo de unu el la plej grandaj dramaj teatroj de la lando oni reprezentas dramon de germana verkisto. Ĉu tio ne estas strange? Neniu starigis tiun demandon. Por ni, sovetiaj homoj, estis klare: ekzistas du Germanioj — faŝisma Germanio, kiu volas sklavigi ĉiujn popolojn, kiu batalas por potenco de mallumo, kaj ekzistas alia Germanio — Germanio de grandaj pensuloj, revoluciaj agantoj, scienculoj, poetoj kaj verkistoj. Al tiu alia Germanio apartenas Gerhart Hauptmann. Tio estis en la jaro 1941a.

Kaj nun — rememoroj pri la neforgesebla jaro 1945a, jaro de Venko. Sur liberigita el faŝisma jugo tero de Orienta Germanio komenciĝas nova, paca vivo — ekonomia, socia, kultura.

Kaj la „kulturaj oficiroj" de SMAG havis multe da zorgoj:

— en lernejoj oni devis rekomenci lernadon, sed sen lernolibroj kun faŝismaj insignoj kaj portretoj de naziistaj krimuloj, malamikoj de la propra popolo;
— oni komencis eldoni la tagĵurnalon „Tägliche Rundschau" por la loĝantaro de liberigita el faŝisma jugo tero;

— komencis siajn dissendojn Berlina Radio;
— malfermiĝis teatroj kaj koncertaj haloj;
— rekomencis labori eldonejoj kaj presejoj, aperis novaj libroj.

La kultura vivo komenciĝis en novaj, vere liberaj kondiĉoj — sen diktato de faŝismaj frenezuloj. La kulturaj oficiroj de SMAG zorgis pri tio, ke devas vivi tiu alia Germanio. Kulturoficiroj ne bezonis longe serĉi eminentajn verkistojn, kulturagantojn, artistojn. Ili mem venis al sovetiaj oficiroj por priparoli, ricevi konsilon, kion oni fari en novaj kondiĉoj, kiam ne ekzistas plu faŝisma mallibero. La kulturoficiroj renkontiĝis baldaŭ post fino de la milito kun Bernhard Kellermann, Hans Fallada, Ricarda Huch, kaj aliaj eminentaj germanaj verkistoj. En unu el la aŭtunaj tagoj la kulturoficiroj de SMAG, kaj kune kun ili la poeto Johannes R. Becher, decidis veturi al Agnetendorf (sur teritorio de Pollando) kaj viziti Gerhart Hauptmann. Ili venis en la domon, kie loĝis verkisto, malsana, alforĝita al la lito.

— Tio estas plu, ol mi atendis — mallaŭte prononcis la malsana verkisto, kiam li ekvidis venintajn al li sovetiajn oficirojn. Mi estas kortuŝita per la honoro, kiun vi donas al mi, Mi dankas

Rudolf Hahlbohm

Vojo al Esperanto

Unuafoje mi aŭdis ion pri planlingvo dum mia infaneco. Tiam mi apartenis al infangrupo de „Freidenker-Verband" (Ateisto-Asocio). Komence de la dudekaj jaroj ni aŭdis diskuton inter la plenaĝuloj pri la internacia lingvo „Ido".

Kelkajn jarojn poste mi lernis en presejo la profesion de litografo. Mi aktivis en la sindikata junularo kaj fariĝis membro de Komunisma Junularo Asocio de Germanio. Tie kaj ankaŭ inter la junuloj de aliaj junularorganizaĵoj de la laborista klaso regis interes pri la problemo de internacia komunikado. Ni konkludis lerni Esperanton en kurso de Laborista Esperanto-Asocio. Estis la jaro 1928. Komenciĝis la Monda Ekonomia Krizo kaj mi mem komencis kelkjaran migradon tra granda parto de Eŭropo. Dum aventuraj vojaĝoj, ĉefe en sudaj landoj mi povis kompletigi mian Esperanto-scipovon.

1933 denove en Germanio, komenciĝis la nokto de faŝisma jugo, kiu ankaŭ sufokis la Esperanto-movadon. Mi konatiĝis kun la koncentrejo Sachsenburg.

Jardekon pli poste mi troviĝis kiel soldato en militkaptejo en Meza Anglio, ankaŭ tie mi trovis anglan esperantiston, kun kiu mi poste longtempe korespondis.

Reveninta al la Sovetia Zono de Germanio mi aliĝis al SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), kaj en 1948 mi partoprenis SAT-Mondkongreson en Amsterdam. La limojn mi venkis dumnokte.

Tiam mi vivadis en eta vilaĝo, sen Esperanto-kontaktoj. Iam mi estis ofice en Bukarest, tie mi tute hazarde venis al Esperanto-kurso. Tio instigis min denove serĉi kontakton al gesamideanoj. Estis tempo dum kiu mi reprezentis la pupteatrojn de nia respubliko en la prezidio de „Union Internationale des Marionettes" (UNIMA), kie mi pledis por uzado de Esperanto por pupteatraj celoj. En Berlin, kie mi nun loĝis kaj laboris, mi serĉis kaj trovis kontaktojn al malnovaj esperantistoj.

Komunaj klopodoj kondukis al fondo de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo, historia proceso sufiĉe konata. Nuntempe ankaŭ multaj pupteatroj en la mondo jam uzas Esperanton, apogita de UNIMA.

---

la novan venkintan Rusion, kies homoj estas la unuaj, kiuj vizitis min en tiu malfacila tempo de mia soleco.

La sovetiaj oficiroj rakontis al la verkisto, ke en la komenco de la milito oni prezentis sur la scenejo de Vaĥtangov-teatro lian dramon „Antaŭ sunsubiro". Kompreneble, Gerhart Hauptmann ne sciis pri tio. Li delonge rakontis al la sovetiaj oficiroj pri siaj amo kaj amikeco kun la rusa literaturo kaj teatro.

— Ĉu vi scias, diris la verkisto, — antaŭ la unua mondmilito neniu en Germanio tiel amis rusan literaturon, kiel mi. Kaj en Rusio oni komprenis min tiel, kiel, mi supozas, nenie ...

Kion tio signifas, oni ne bezonis klarigi al la sovetiaj oficiroj. Ili bone sciis, kiel oni eldonis kaj reeldonis en Soveta Unio verkojn de Gerhart Hauptmann, prezentis ilin sur scenejoj de teatroj. Kortuŝa, intima amikeco kunligis Gerhart Hauptmann kun la Moskva arta teatro, kies fondintoj estis Stanislavskij kaj Nemirovič-Dančenko. Sed tio estas speciala temo. Se legantoj esprimos la deziron, ekscii pri tiu paĝo de historio de niaj kulturaj ligoj, mi volonte daŭrigos tiun rakonton en unu el sekvontaj artikoloj.

Georgo Korotkevič

Ludwig Schödl

Begegnung mit Freunden

(Resumo: La aŭtoro rakontas, kie Esperanto ludis rolon en la kreo de amikaj fortaj rilatoj al Soveta Unio kaj mencias kelkaj faktojn el la historio de la Laborista Esperanto-movado. Li rakontas plue pri la helpo, kiun li ricevis flanke de sovetiaj oficiroj post 1945 kiel juna instruisto. La rilatoj al sovetiaj esperantistoj daŭras kaj estas intensivaj ĝis hodiaŭ)

Bis zum Jahre 1930 fühlte ich zur jungen Sowjetmacht eine tiefe Sympathie, wie sie von Millionen Arbeitern in der ganzen Welt geteilt wurde. Aus dieser Sympathie wurde eine enge Verbindung für mein ganzes Leben, nachdem ich Esperanto gelernt hatte.

Im Arbeiter-Esperanto-Bund entstand damals eine Singegruppe, und wir wollten noch unbekannte russische Lieder in unser Repertoire aufnehmen. Ich wurde beauftragt, zu diesem Zwecke die Verbindung mit Moskauer Esperantisten aufzunehmen. Es war erstaunlich, wie schnell unsere Freunde, die Genossen Drezen und Nekrassow, reagierten und viele neue russische Lieder, denen sie eine ausgezeichnete Esperantofassung gegeben hatten, schickten. Wir traten mit diesen Liedern mit großem Erfolg bei vielen Veranstaltungen verschiedener Arbeiter-Organisationen auf.

Damit Esperanto nicht nur den Esperantisten helfe, und um es zur Vertiefung der Freundschaft zwischen unseren beiden Völkern breiter zu nutzen, beschlossen wir, Verbindungen herzustellen und hierbei nicht nur als Vermittler, sondern auch als Übersetzer zu fungieren. Es erschien hierzu eine kleine Anzeige im INTERNACIISTO, dem Organ der Internationale Proletarischer Esperantisten, mit dem Angebot, solche Korrespondenzen zu vermitteln. Dazu meine Anschrift. In den ersten Wochen dachte ich, die Anzeige würde unbeachtet verhallen. Doch dann kamen die ersten Wünsche aus dem Ausland. Bald wurde daraus eine Flut. Wochen- und monatelang kamen täglich mehrere Briefe, darunter die weitaus meisten aus der Sowjetunion. Da war ein Kollektiv einer Lokomotiv-Reparaturwerkstatt, dann eine Schachgruppe, eine Feuerwehrwache in Leningrad, Kindergruppen, usw. usf. Ich war zwar arbeitslos, wie fast alle meine Freunde, aber es war kaum noch zu schaffen. Aus dieser Zeit erinnere ich mich noch am besten an meinen Freund Viktor Viktorovitsch. Das war ein selten flotter Briefwechsel. V. V. sprach im Rundfunk, spielte Theater, leitete ein Schauboot am Dnepr. Er schickte nicht nur Fotos, sondern auch Filmstreifen, auf denen er dutzende Male zu sehen war, er hatte immer konkrete Anliegen für seine vielseitige Tätigkeit.

Die russischen Freunde halfen uns mit ihren Briefen ausgezeichnet, mit den Menschen zu diskutieren. Ein Brief direkt aus der Sowjetunion, ein persönlicher Brief, dem Widersacher oder Zweifler unter die Nase gehalten, war weitaus wirksamer als die besten Argumente unserer Presse. Dazu überschütteten sie uns mit Literatur in Deutsch und Esperanto. Wie oft blätterte ich mit Bekannten in der wundervollen Zeitschrift „UdSSR im Bau" und steckte sie mit meiner Begeisterung an, zum Beispiel, wie unter der Sowjetherrschaft der Dnepr bezwungen wurde.

Im August 1934 führte die Internationale Proletarischer Esperantisten in Lille/Nordfrankreich eine Konferenz durch. Es ging um die Fortführung der Arbeit unter den Bedingungen des Faschismus in Deutschland. Unterschiedliche Meinungen prallten hart aufeinander. Tiefen Eindruck hinterließ auf uns alle der bekannte russische Schriftsteller Genosse Iljin (Ilja Jakowlewitsch Marschak, 1895 — 1953), der die sowjetischen Esperantisten vertrat.

Bald darauf hatte ich eine rege Korrespondenz mit dem Journalisten Genossen Timofenko aus Nikopol. Ich wohnte in der Nähe von Paris. In dieser bewegten Zeit von Klassenkämpfen, bei denen es galt, den schnell erstarkenden Faschismus in Frankreich zu schlagen — die erste Schlappe mußte

er im Februar 1934 hinnehmen — mit einer nie gekannten Welle von Streiks, die oft politische Ziele hatten, mit der in Frankreich neuen Form der Streiks unter Besetzung der Betriebe, die schließlich 1936 zum Sieg und zur Bildung der Volksfrontregierung führte, gab es immer reichlich Stoff für unseren Briefwechsel. Viele dieser Briefe fanden ihren Widerhall in sowjetischen Zeitungen.

Im Mai 1945 lernte ich die sowjetischen Soldaten wieder von ihrer echt humanistischen Seite kennen. Das schönste Objekt im Bezirk Reinickendorf in Berlin, das unversehrt war, war Reiherwerder. Inmitten eines schönen Parks am Tegeler See steht ein schloßartiges Gebäude mit Sälen, Fremdenzimmern, einer großen Küche. Die sowjetischen Freunde stellten dieses Objekt, das einst dem Großindustriellen Borsig gehörte, sofort als Heim für Jugendliche, deren Eltern Opfer des Faschismus waren, zur Verfügung. Ich durfte dort etwa 30 Jugendliche betreuen. Das Idyll dauerte jedoch nicht lange. Es wurde die Teilung Berlins in die vier Besatzungssektoren durchgeführt, Reiherwerder befand sich im französischen Sektor. Unangemeldet erschien eine Gruppe französischer Offiziere, unter ihnen General König. Ich bin weit in der Welt herumgekommen und habe viele Menschen kennengelernt. Nie zuvor sah ich eine solche Arroganz. Sie mußten wissen, wer und was wir waren, aber sie sahen uns einfach nicht. Sie untersuchten genau alle Räume und verschwanden wieder in ihren Autos. Kurz danach teilte uns die Stadtverwaltung mit, daß das Gebäude sofort geräumt werden müßte. Es fand sich kein anderes Objekt für uns: Es war aus, von einem Tag zum anderen. In dieser Zeit war ich einmal bei einem sowjetischen Offizier in Weißensee. Ich fand ihn in einer winzigen Dachkammerwohnung. Ich dachte an General König in der Luxusvilla. Der sowjetische Offizier sah auch nicht durch mich hindurch wie der General. Im Herbst 1945 sollten wieder die Schulen eröffnet werden. Dies schien zunächst unmöglich, denn, sollten die Lehrer, die die Pimpfe und Hitlerjungen erzogen hatten, weiter „erziehen"? Der Mangel an unbelasteten Lehrern schien alles in Frage zu stellen, besonders auf dem Lande. Unter den neuen Lehrern in den verwaisten Dorfschulen befand auch ich mich. Es war damals gar nicht so einfach, von Berlin in den Ruppiner Kreis zu gelangen. Der Zug nach Rheinsberg fuhr nicht alle Tage und wenn, dann mußte man erst einmal einen Platz in oder auf dem Zug, zwischen zwei Wagen oder auf einem Trittbrett finden. Als mir dies fast nicht gelingen wollte, wandte ich mich an sowjetische Soldaten, die zwei reservierte Abteile hatten und machte ihnen den Zweck meiner Reise klar, und sofort ließen sie mich mit in ihr Abteil quetschen. In dem entlegenen Dorf galt es nicht nur, Kinder zu unterrichten und zu erziehen, sondern auch, aus den Köpfen der Eltern den faschistischen Unrat abzutragen. Trotz der pessimistischen „guten" Ratschläge, es nicht mit den Eltern zu verderben, fing ich an, abends im Dorfkrug Vorträge zu halten und Aussprachen zu organisieren. Ich begann mit dem heißen Eisen: „Die Russen und wir". Der kleine Saal war überfüllt. Ich wurde nicht — laut Prophezeiung — verprügelt, sondern brachte meine Zuhörer zum Nachdenken. Aus der Schule der ersten Jahre nach der Befreiung ist nicht der sowjetische Offizier, Genosse Stern, hinwegzudenken, der oft den Kreisschulrat bei seinen Unterrichtsbesuchen begleitete. Er stand immer mit Rat und Tat zur Seite und half, wo er nur konnte in dieser Zeit ohne Schulbücher, ohne Hefte, wo Tafelkreide schon zum Problem wurde, ganz zu schweigen von Unterrichtshilfen.

Anfang der 50er Jahre erhielt ich die ersten Briefe nach dem Kriege aus der Sowjetunion. Wieder in Esperanto. Ein bis zwei Jahre blieb es bei zwei Brieffreunden, aus Moskau der eine, aus Leningrad der andere. Doch dann kamen in schneller Folge Brieffreunde aus Archangelsk, Taschkent, Jaroslawl, Kiev, Simferopol, Krasnodar, Sewastopol und anderen Städten hinzu. Es waren immer Briefe voller Herzlichkeit, obwohl unter diesen Freunden kaum einer ist, der nicht Angehörige durch deutsche Soldaten verloren hat. Meist

Werner Plate

Valoras vivi kaj agi

Je la fino de la 20aj jaroj mi legis en laborista gazeto pri Esperanto, kio plaĉis al mi kaj finfine instigis min lerni Esperanton por kontakti homojn en fremdaj landoj. Ankoraŭ dum mia prefesia lernado, dum la jaro 1930, mi partoprenis E-to-kurson en Rostock kaj konatiĝis kun Rudi Graetz kiel favora aganto de E-to kaj klaskonscia laboristo. Kune kun li ankaŭ Wally Stelt — lia posta edzino — Robert Stoll, Franz Gieraß, August Wilken kaj multaj aliaj. Enviciĝinte en la LEA-grupon kiel juna komencanto, 17jara, mi vojaĝis Pentekoste 1931 kune kun ĉirkaŭ 30 mecklenburgaj geesperantistoj al svedaj amikoj en Hälsingborg. Tio estis la unua testo de E-to por mi en eksterlando. Dank' al la perfekta gastigantino, kie mi loĝis 8 tagojn, mi perfektiĝis. En Hälsingborg ni komune aranĝis mitingon en la Popoldomo, ĉeestis ĉ. 90 personoj. Ni faris urborondvojaĝon, vizitis kuprominejojn kaj uzinojn kaj parolis kun laboristoj pri ties vivkondiĉoj. Kulmino estis la adiaŭa demonstracio, kiu tre impresis min. Ekde tiu tempo mi intensive kunagis en la grupo kaj vastigis la propran korespondadon, precipe al Sovetunio. La ekonomian mondkrizon 1928—1933 ni en Germanio sentis tre forte. Tiutempe mi ankaŭ finis mian profesian lernadon. Kun la ekzamena testo mi ankaŭ tuj ricevis la maldungon. Do, tiam ankaŭ mi apartenis al la granda armeo de 7½ milionoj da senlaboruloj en Germanio. Esperanto estis miraklo trans limoj — dank' al la estro de la E-to grupo en Hälsingborg, k-do Artur Lundgren proponis al mi veni al Svedio. Tie mi estis 4 monatojn, sed la krizo ankaŭ tie pligrandiĝis, kaj mi reveturis al Rostock. Intertempe mi jam korespondis kun Nederlando, Britio, Bulgario, ĈSR kaj Hispanio. Samtempe la faŝismo preparis la plej nigran tempon en la germana historio! 1933 oni malfondis ankaŭ la laboristan E-to organizaĵon. Tamen mi ankoraŭ kuraĝis korespondi, sed tio ne regule funkciis! La 2an de aŭgusto 1936 mi ankoraŭ lastfoje intencis kontakti kun esperantistoj en Nyköbing (Danio), sed la Gestapo kunveturis kun la ŝipo kaj observis nin. Do ni nur povis interŝanĝi kelkajn vortojn kun la danaj esperantistoj. Sekvontan tagon la Gestapo faris traserĉon en la hejma loĝejo, forprenis la tutan E-to-materialon kaj malpermesis je punminaco al ni, la daŭrigon de la Esperanto-agado! La korespondado ekde tiu tempo ne plu funkciis.

Dum la milito en la jaro 1942 mi povis en Apeldoorn (Nederlando) kontakti esperantistojn, bedaŭrinde post kelkaj semajnoj oni ŝanĝis la lokon. Tamen ni povis interŝanĝi informojn pri la kruelaj faŝismaj militkrimoj!

En la jaro 1946 mi denove kontaktis kun Rudi Graetz en Schwerin, kaj li optimisme parolis pri la novfondo de E-to grupoj. Sed nur meze de 1965 ni denove povis okupiĝi, tiam en la vicoj de Kulturligo, pri Esperanto. Mi ne

---

resto de p. 101

stand unsere Korrespondenz unter dem Zeichen gegenseitiger Hilfe im Kampf um den Frieden. Meine sowjetischen Freunde sandten zu verschiedenen Anlässen auf meinen Wunsch Materialien, die ich bei Ausstellungen und Vorträgen verwerten konnte und umgekehrt. Durch unsere Hilfe wurden Alben zwischen Schulklassen ausgetauscht, Fern-Sportkämpfe zwischen Schulen ausgeführt, unzählige Kinderkorrespondenzen vermittelt. Einige Jahre gab es durch unsere Vermittlung und Hilfe eine Patenschaft zwischen der Schule des Friedens, Neuruppin und der 2. Mittelschule in Rostow/Don. Bei den Weltkongressen der Esperantisten 1963 in Sofia und 1966 in Budapest, bei unseren Reisen in die Sowjetunion und Besuchen aus der Sowjetunion lernten wir viele unserer Korrespondenten persönlich kennen; „wir", das heißt die ganze Familie. Diese Freundschaft zur Sowjetunion und zu ihren Menschen ist unlösbar.

hezitis kaj ĝoje mi trovis k-dojn Rudi Graetz kaj Detlev Blanke en la unuaj vicoj. Jam la 2an E-to-kurson por komencantoj, kun 35 partoprenintoj, mi gvidis. Esperanto, la lingvo de la amikeco kaj popola interkompreniĝo ne havis ian prestiĝperdon! Ni formis en Rostock novan fortan E-to-grupon kaj unu sukcestravivaĵo sekvis la alian. Ampleksaj internaciaj korespondadoj al socialismaj landoj, ĉefe al Soveta Unio riĉigis nian horizonton. Esperanto tutcerte kontribuas al kleriĝo de personeco. Mi mem de post longaj jaroj aktive kunlaboras en sub- kaj distrikta estraroj kaj en la Centra Estraro de GDREA. Ĝemelurbaj kontraktoj firme ligas nin kun Szczecin, Riga kaj Varna. La amikecveturado de la Asocio por Germana-Sovetia Amikeco (DSF), kiu entenis 250 e-tistojn el GDR al Leningrad en la jaro 1971 donis al mi novajn fortojn al kunlaboro. Dum la omaĝo al la 600 000 viktimoj en la tomboj de Leningrado, mi hontis pro la kruelaĵoj de la faŝistoj. Tamen oni traktis nin kiel Esperanto-amikojn. Mi povas konstati, ke en ĉiuj 15 respublikoj de Sovetunio, kiujn mi vizitis, mi trovis amikojn pere de E-to. Tio jam valorigas la lernadon kaj okupiĝon pri Esperanto!

La intensigo de la minacado de socialismaj kaj aliaj progresemaj popoloj flanke de la imperialismaj ŝtatoj donis al ni la taskon, pli aktive apliki E-ton por la defendo de la paco en niaj regionoj. Tio estas laŭ mia opinio la plej grava tasko en la nuna 40jara paca evoluo. Apliki Esperanton en la servo por popolamikeco kaj konservo de la paco, tio jam valorigas vivi kaj agi. Ankaŭ Esperanto nur povas prosperi en tutmonda Paco!

Erich Würker

Ordono estas ordono

La batalo en Berlin ĵus finiĝis. La Ruĝa Armeo okupis la urbon, dume Vogtlando kune kun mia hejmurbo Reichenbach troviĝis en la manoj de la usonanoj. Je tiu tempo mi estis teknika ĉefo en la plej granda teksaĵa fabriko por tinkturi kaj apreti teksaĵojn en Reichenbach. Sed la fabrika tereno estis detruita far la usonanoj je kvindek procentoj. Bombardado de la milite sensignifa urbo kaŭzis gravajn damaĝojn kaj 150 viktimojn inter la loĝantaro. Antaŭ eniri en la urbon, la 17an de aprilo 1945, la usonanoj ĵetadis denove artileriajn grenadojn, estigis pluajn detruojn kaj viktimojn, kvankam ne unu germana soldato troviĝis en la urbo. La tuta vivo stagnis.

Surprize, kiam matenis la 1a de julio, la usonaj soldatoj estis malaperintaj. Dumnokte ili forlasis senrimarkite la urbon, postlasis nur la ruinojn kaj la nefunkciantan industrion. De buŝo al buŝo disvastiĝis la onidiro, ke la rusoj venos, ĉar laŭ interkonsento inter la aliancitaj potencoj Reichenbach apartenus al la sovetia okupacia zono. Ti meme kaj kun angoro la plej multaj homoj atendis la alvenon de la „aziaj hordoj", kiel la nazioj kutimis karakterizi la trupojn de la Ruĝa Armeo. Zorgoplena premateco regis pro la nekonataj venontaj eventoj. Pli ol unu sin vidis jam kiel punlaboristo en Sovetunio, por ripari tie la totalajn neniigojn faritajn de la naziaj invadintoj. La saman tagon taĉmentoj de la Ruĝa Armeo okupis la urbon. Sed nenia malbono okazis. „Hodiaŭ ankoraŭ ne" oni konkludis, „Atendu nur — morgaŭ!" Tamen la tagoj pasis, iu ajn malagrablaĵo ne estis konstatebla.

Je la 29a de julio 1945 atingis min la Ordono Nr. 9 de la Sovetia Milita Administracio en Germanio, laŭ kiu la fabrikoj en la sovetia zono devas rekomenci la produktadon. Kvankam ni sub mia gvido jam kreis provizore funkcipreton por la ĉefaj partoj de la duonruinigita fabriko, tamen la efektivigo de la ordono montriĝis absolute neebla. Mankis prilaborendaj teksaĵoj, hejtmaterialoj k. t. p.

Tia estis mia negativa bilanco, kiun mi devis prezenti al la sovetia urba komandanto. Sed la oficiro skuis la kapon. „Ordono estas ordono", li rimarkigis. Li igis min atendi kaj for-

lasis la ĉambron. Kiam li post kelka tempo revenis, mi spertis frapantan surprizon. „Morgaŭ vi estos atendata ĉe la sidejo de la ruĝarmea ekonomia sekcio en Karlshorst" li min informis. „Veturu senprokraste tien kaj klarigu al la tieaj kamaradoj vian seneliran situacion!"

Kun dubaj sentoj mi veturis al Karlshorst. Kio min atendus tie? Nova surprizo! Sen iu ajn formalaĵo oni montris al mi specimenon de kruda teksaĵo el la stoko de la Ruĝa Armeo kaj samtempe specimenon de uniforma mantelŝtofo. Simple oni min demandis: „Ĉu vi kapablas produkti el tiu kruda teksaĵo mantelŝtofon de tiu kvalito?" Zorgeme mi ekzamenis ambaŭ specimenojn. Fine mi respondis: „Jes, tio estas nia specialaĵo. Sed kondiĉo estas la disponigo de brulaĵo por la vaporkaldronoj kaj por la energioproduktado. Tinkturon kaj kemiaĵojn ni bezonas."

Hejmenvenante mi kunportis ne nur ampleksan komision rilate al apretado de mantelŝtofoj por la Ruĝa Armeo sed ankaŭ la necesajn kontingentojn por la helpmaterialoj.

Kiel respondecan partneron por la komisio oni nomis al mi la sovetian distriktan komandejon en Plaŭen. La helpo kaj konsekvenca devokonscio de la sovetiaj homoj, — ordono estas ordono —, ebligis al ni komenci la produktadon precize je la fiksita dato.

Konscience ni laboris kaj trovis en Plaŭen kontentecon kaj laŭdon. Iom post iom evoluis reciproka konfido, kaj mi eĉ akiris iagradan reputacion. La vivobazo por pli ol 350 gelaboristoj kaj la pluekzisto de la tuta entrepreno, la intertempe evoluinta hodiaŭa „VEB Textilveredlungswerk Reichenbach" estis garantiitaj. Timoj kaj antaŭjuĝoj malaperis.

La sukcesplena kunlaboro donis al mi la kuraĝon interveni ĉe la komandejo en Plaŭen favore al la ankoraŭ malpermesita Esperanto. Ankaŭ tiurilate mi trovis komprenemon kaj helpon. Flanke de la sovetia urbkomandanto en Reichenbach mi ricevis jam la 8an de aŭgusto 1946 la permeson, fondi Esperanto-grupon sub la ŝirmtegmento de la „Kultura Ligo".

Nepre necesas rememorigi ĉion ĉi. Ni homoj emas facilanime forgesi, kion ni dankas al la sovetiaj kamaradoj dum tiu malfacila epoko.

FRIDA

Meze de novembre 1942 j. alvenis en Berlino mezstatura palvizaĝa fraŭlino. Ŝi luis ĉambreton en Albrechtstr. 14. En sia valizeto ŝi kunportis rekomendleteron de la germana ambasadoro en Sofio lia moŝto Beckerlle. En la letero li asertis, ke fraŭlino Krästana Janeva estas pursanga bulgarino, kiu deziras studi germanan filologion. Beckerlle pledis, ke oni ebligu al ŝi specialigon en la universitato Humboldt. Ĉe tia grava rekomendo oni tuj akceptis ŝin kaj promesis subteni per stipendio. Kompreneble ambasadoro Beckerlle, eksestro de gestapo en Köln, ne supozis, ke Janeva estas membro de kompartio de Bulgario.

Dum siaj promenoj tra Berlino, Krästana trovis la domon, kiu servos kiel renkontejo por ŝi. La virino, kiu malfermis al ŝi la pordon, estis mezaĝa kun grizharoj ĉe la tempioj.

— Mi serĉas sinjorinon Klara Schabel, — diris la fraŭlino kun akcento de alilandanino.
— Jen estas mi, — respondis Schabel.
— Mi estas Frida.

La fremdulino eldiris la necesan signalparolon kaj Klara akceptis ŝin kun fido kaj helppreteco. Schabel estis en la komunista movado antaŭ la unua mondmilito kaj apartenis al organizaĵo de Schulze Boysen kaj Harnak. Ŝia tasko estis trovi kaŝlokojn por persekutataj antifaŝistoj.

Plene konfidante al la germana komunistino, Frida rakontis, ke ŝi venis Berlinon por kontribui al la rezista organizaĵo.

Klara priskribis la situacion en Berlino. Gestapo ĵus malkovris la organizaĵon de Schulze Boysen-Harnak kaj arestis kelkcent kontraŭulojn de Hitler. Ankaŭ Klara estas suspektata, pro tio Frida estu singardema. Estonte ili renkontiĝos en aliaj kaŝlokoj.

Dank' al Schabel Frida kontaktiĝis kun anoj de la organizaĵo de Anton Saefkow, Franz Jacob kaj Bernhard Bästlein. Oni liveris al ŝi informojn de politika kaj ekonomia karaktero kaj ŝi transsendis ilin al la Centro.

Dum aprilo 1943 gestapo kaptis nekonatajn radiosignalojn. Post daŭra observado kaj analizado oni konstatis, ke la radiosignaloj venas el la kvartalo ĉirkaŭ Friedrichsbahnhof. Ĉiuj domoj estis traserĉitaj kaj ankaŭ la domo, en kiu loĝis Frida. Ĉe la traserĉado oni trovis nenion, ĉar ŝi sukcesis detrui la radioaparaton kaj ĵeti ĝin en la ruinojn de apuda bombita konstruaĵo. Tamen oni arestis ŝin.

La sekreta radiostacio ĉesis funkcii kaj tio damaĝis ŝian reputacion. Samtempe gestapo daŭrigis serĉi kunlaborantojn de Boysen. Oni arestis Schabel kaj ŝian edzon, francdevenan komuniston Robeson. La edzon oni eskortis al Francio, kaj Klara en la domon de gestapo. Oni konfrontis ambaŭ virinojn kaj submetis ilin al torturo per akvo kaj elektro. Klara kaj Frida silentis.

La 27an de aprilo Frida estis translokigita al prizono Moabit. Tie la esplorado daŭris kelkajn monatojn.. Intertempe gestapo postulis de la policdirekcio en Sofio detalajn informojn pri Krästana Janeva. Oni pridemandis en la kvartalo, kie ŝi loĝis, sed la referencoj estis favoraj por ŝi. En la lernejo, kie ŝi instruis antaŭ ol veturi al Berlino, la direktorino atestis, ke Janeva ne okupiĝis pri politiko, estis akurata instruistino de germana lingvo. Ja neniu el la pridemanditaj homoj sciis pri la sekreta laboro, kiun Janeva faris por la Ruĝa armeo. Nome ŝi estis kunlaborantino de la proleta poeto kaj esperantisto Nikola Vapcarov, mortpafita en julio 1942 j. kune kun kelkaj funkciuloj de BKP.

Kvankam mankis materialaj pruvoj pri ŝia agado, la supera milittribunalo mortkondamnis ŝin je la 22-a de junio, 1943 j. En Moabit ŝi ekatendis la konfirmon de la verdikto.

Estas nekredeble, tamen fakto, ke en la prizono ŝi trovis kunsenton. La dek-

kvarajara filineto de iu gardistino kun permeso de la prizonestro helpadis al sia patrino. La knabino faradis malgrandajn servojn al la malliberulinoj, kiuj baptis ŝin Sonnenschein.

Dank' al Sonnenschein Krästana kontaktis kun medicina studento Dorĉev, konato el Sofio. Pere de la studento ŝi sendis leterojn al siaj parencoj. Gepatrojn ŝi perdis dum la milito 1917 j. En Sofio ŝi loĝis ĉe sia onklino, kiu havis du filinojn. Jen kelkaj linioj el letero:

„Karaj onklino kaj kuzinoj! La leteroj, kiujn mi ricevas de vi, kuraĝigas kaj konsolas min. Ĝis nun mi ne informis vin pri mia situacio, por ne maltrankviligi vin. Nun tamen vi sciu, ke la supera milittribunalo juĝis min kaj la 22-an de junio eldiris mortverdikton. Malgraŭ tio vi ne devas teruriĝi. Mia advokato esperas, ke oni decidos pri pli milda verdikto."

Post kelkaj semajnoj Krästana denove skribis:

„Kara onklino, mia situacio estas tute serioza. Mia verdikto estas konfirmita. Mi volas certigi vin, ke mi paŝos al la eŝafodo kuraĝe, sen ĝemploro. Mi mortos trankvile, ĉar mi laboris por

baldaŭa militfino, por ke vivu en paco ĉiuj infanoj en la mondo. Mia animo estas saturita de amo kaj espero. Mi nenion bedaŭras. Mi kredas al la hela estonteco de la homaro kaj scias, ke por venigo de tiu estonteco estas necesaj oferoj. Nia afero estas sankta kaj por ĝi mi oferas mian vivon."

Post konfirmo de la verdikto oni translokigis ŝin en ĉelon, kie troviĝis antifaŝistinoj el Pollando kaj Belgio. La belgino Bety Depelsner transvivis la nazidiktaturon kaj skribis al parencoj de Janeva:

„Krästana venis en nian ĉelon fine de julio. Ni tuj interamikiĝis. Ŝi estis certa, ke oni gilotinos ŝin kaj ripetis: „Mi pereos, sed niaj ideoj estas senmortaj. Unuj falas en la batalo, aliaj daŭrigas ĝin, ĝis la fina venko."

La 5-an de aŭgusto en Berlin-Plötzensee estis gilotinita Klara Schabel. La saman tagon Krästana estis translokigita al prizono por virinoj sur str. Barnim. Tie ŝi laboris, flikis eluzitajn soldatajn uniformojn kaj sangumitajn mantelojn. Ekestis malvarma vintro. Kun frostaj fingroj ŝi tenis tondilon kaj kudrilon, superŝutata per insultoj de severa laborestro. Ŝia labortago daŭris del du horojn. Ĉiumatene ŝi atendis, ke oni transportu ŝin al Plötzensee. Tutajn 16 monatojn ŝi atendis! Intertempe gestapo arestis la kamaradojn, kun kiuj Frida kunlaboris: Anton Saefkow, Franz Jacob kaj Bernhard Bästlein. Konfrontiĝo kun ili. Nenia rezulto por gestapo. En septembro 1944 la tri fidelaj kamaradoj estis gilotinitaj. Kaj ŝi ankoraŭ vivis kun premita koro.

En oktobro la kalvario kondukas ŝin al Halle. En la ĉelveturilo ŝi trafas bulgarajn studentojn, kiujn oni eskortas al Buchenwald. Iu el ili flustris al ŝi, ke en Bulgario venkis Patrolanda fronto kaj la popola registaro deklaris militon al Nazipotenco. Pro tio ĉiuj bulgaraj studentoj estas aliloĝigataj en KZ.

La nova „loĝloko" de Krästana estis la urba prizono en Halle. Ĉi tie la kelo servis kiel ekzekutejo. La 23-an de oktobro ŝi genuis sub la peza tranĉilo de la gilotino. En la registrolibro oni mensoge skribis, ke ŝi mortis „pro kormalsano".

Nun ŝiaj ostoj kuŝas en la amastombo de la sovetiaj soldatoj en la parko de Halle. Sur la ŝtontabulo ŝia nomo estas iom malguŝte skribita — Kritana, anstataŭ Krästana, tamen la familia nomo estas ĝusta — Janeva.

Gelernantoj el lernejo „Georgi Dimitrov" ofte vizitas la amastombon kaj zorgas pri la tombo de Frida.

Ankaŭ la bulgara junularo ne forgesas ŝin. Multaj lernejoj prenis sur sin la patronecon de Krästana Janeva.

„Mi pereos, sed niaj ideoj estas senmortaj!" — ofte oni citas ŝiajn adiaŭajn vortojn.

H. M. Hrima

Ni kore gratulas al

— Else Köster, Rostock, kiu fariĝis 75jara la 25an de aŭgusto 1985
— Paul Boden, Pulsnitz, kiu fariĝis 90jara la 24an de novembro 1985
— Otto Leichert, rFeital, kiu festis sian 85an naskiĝtagon la 3an de februaro 1985
— Karl Krause, Zittau, pro la 80a naskiĝtago, la 18an de septembro 1985
— Otto Mokroß, Heidenau, kiu festis sian 80an naskiĝtagon la 17an de novembro 1985
— Achim Zettier, Prenzlau, pro la distingo per la Johannes-R.-Becher-Medalo en bronzo, la 2an de julio 1985
— Edeltraud Zettier, Prenzlau, pro la distingo per la Honorinsigno de GDREA

Ni funebras pro la

— forpaso de la iama laborista esperantisto Alfred Bachmann el Karl-Marx-Stadt, 82-jara, la 23an de aŭgusto 1985
— forpaso de la iama laborista esperantisto Erich Rödel el Leipzig, 81jara, la 6an de aprilo 1985
— forpaso de la konata sovetia esperantisto-veterano I. I. Palkin el Moskvo, la 13an de aŭgusto 1985, kiu dum multaj jaroj estis peranto por „der esperantist" en Soveta Unio

---

resto de p. 107

Notoj:

[1]) Adressario. Union Mundial pro Interlingua. New York 1964, 26 p.

[2]) Adressario de Interlingua. Union Mundial pro Interlingua. Beekbergen 1975, 16 p. (2a eldono)

[3]) Adressario de Interlingua. Union Mundial pro Interlingua. Odense 1985 (5a eldono), 8 p.

Detlev Blanke

Kiom da Interlingua-anoj?

Fojfoje aperas en revuoj de eksterlando (Ekz. ĈSSR) artikoloj pri Interlingua (Gode 1951) kun la pretendo, ke Interlingua estas pli taŭga kiel lingvo de scienco, estas pli „moderna" (sen difini kio estas „moderna" en lingvistiko). Ni ĉi-tie ne traktos la lingvistikan aspekton de Interlingua sed nur iom ĝian socian bazon. La „lingveco" de lingvo dependas ĉefe de sia lingvoparolantaro. Lingvo sen uzantaro nur ekzistas kiel historia pasintaĵo. Filologoj eble povas priskribi la etruskan lingvon, kiu iam havis uzantojn. Sed, ĉar malaperis la etruska gento, ties lingvo nun estas lingvo pasinta. La etruska ne plu funkcias kiel komunikilo — escepte, se du filologoj decidas lerni kaj ekuzi ĝin.

Interlingua havas limigitan aron da uzantoj. Pri tio informas i. a. la adresaroj (Adressario de Interlingua). Mi analizis la unuan (1964)[1]), duan (1975)[2]) kaj kvinan (1985)[3]) eldonon. La indikojn mi ordigis en jena tabelo:

Registritaj Interlingua-anoj

		1964	1975	1985
1	Alĝerio	—	—	1
2	Andoro	—	—	1
3	Argentino	—	—	1
4	Aŭstrio	6	3	1
5	Aŭstralio	2	—	—
6	Belgio	3	2	—
7	Brazilo	—	1	1
8	ĈSSR	23	15	5
9	Danlando	37	28	3
10	Finnlando	2	—	—
11	Francio	51	11	6
12	FRG	13	4	1
13	Gabono	1	—	—
14	GDR	4	1	4
15	Grandbritio	42	11	4
16	Hispanio	5	3	—
17	Hungario	—	1	2
18	Irlando	2	—	—
19	Islando	1	—	—
20	Izraelio	1	—	—
21	Italio	11	5	2
22	Japanio	1	—	—
23	Jugoslavio	1	1	—
24	Kanado	5	2	2
25	Kolumbio	—	1	—
26	Meksikio	—	1	—
27	Nederlando	4	7	2
28	Pollando	15	28	4
29	Portugalio	4	2	—
30	Rumanio	3	9	9
31	Senegalo	1	—	—
32	Soveta Unio	7	5	5
33	Sudafriko	2	—	—
34	Svedio	9	20	3
35	Svisio	17	8	1
36	Usono	121	33	3

sume: landoj/anoj

29/394	24/202	21/61
= 100 %	= 51 %	= 15,5 %

Komento:

1. La socia bazo de Interlingua ŝrumpas rapide. Apenaŭ videblas faktoroj kontraŭantaj la ŝrumpadon.
2. La ĉefa regiono de la disvasteco de Interlingua estas Eŭropo. Ĉar IALA (International Auxiliary Language Association) aparte aktivis en Usono kaj tie propagandis Interlingua, ankoraŭ 1964 tie oni registras 121 anojn. Sed jam 1985 restas nur 3 membroj.
3. „Fortaj" eŭropaj landoj 1964 ankoraŭ estis ĈSSR, Danlando, Francio, Grandbritio, Pollando, Svedio kaj Svisio. Sed jam 1985 en landoj ne plu troviĝas eĉ dek registriĝemaj Interlingua-anoj.
4. Tute frapa (sed normala) estas la fakto, ke oni trovas en la Adressario-j ofte esperantistojn aŭ interlingvistojn, kiuj scipovas Esperanton. En la adresaro de 1985 el la 61 anoj 19 ankaŭ indikas Esperanton kiel korespondan lingvon (= 31,15 %). De 4 I-a-anoj en GDR 3 estas aktivaj esperantistoj, membroj de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR.
   1964 inter la registritaj „Interlingua-anoj" i. a. troviĝis André Albault, Evgenij A. Bokarev, Detlev Blanke, Jaromir Jermař, Ebbe Vilborg . . .

Rest auf Seite 106

Sercataj informoj pri W. E. Collinson

Antaŭ kelkaj jaroj mortis la konata interlingvisto W. E. Collinson (naskita 4. 1. 1889 en Birmingham). El lia plumo venis multaj tre bonaj studoj pri interlingvistiko kaj esperantologio. Li tre grave kunlaboris en International Auxiliary Language Association (IALA) kaj verkis por tiu ĉi organizaĵo multajn neniam publikigitajn sendube tre valorajn manuskriptojn. Tiuj manuskriptoj estis disponigitaj al la arkivo de IALA, kiu neniam estis retrovita. Supozeble prof. Collinson ja konservis almenaŭ kopiojn de siaj manuskriptoj hejme. Kiu havas informojn pri la profesoro? Kiu pretus (plej bone en lingvistikaj institutoj de universitatoj) trovi materialojn pri Collinson? Jen mi serĉas aparte du materialarojn:

I. Jen listo de manuskriptoj de Collinson (laŭ la IALA-presaĵo „A Plan of Obtaining Agreement on an Auxiliary World-Language. New York 1936), paĝoj 26 — 27:

— The expression of thought in the sentence, an attempt at a logical orientation of the international language-FL, II-William E. Collinson-ms., 1929 — 33 pp.

— Composite wholes: aggregation and distribution-FL, VII, 1(a), vi-W. E. Collinson-ms., 1929 — 20 pp.

— Ratio and proportion-FL, VII, 1(a), vii-W. E. Collinson-ms., 1929 — 8 pp.

— Singularity and plurality-FL., VII, 3(a)-W. E. Collinson-ms., 1929 — 16 pp.

— Word-building in international languages, an introduction to specific problems-FL., XIV-W. E. Collinson-ms., 1929 — 73 pp.

— Phonetics of L, I, S, F, E, G, an R-CS, I-W E. oCllinson-ms., 1936 — 32 pp.

Comparative studies in constructed languages-W. E. Collinson-ms., 1936 — under way — The usual scheme for each study is: 1, Statement of problem; 2, Data bearing on problem; 3, Arguments for and against possible solutions to problme; 4, Conclusions. Data are to fullest extent possible presented in parallel column for each language. The chief languages compared are Esp, Ido, Nov, Occ, and LSF.

— Phonology and stress-CS, I.

— Provisional nuclear vocabulary (based on the „definition vocabulary" of 1490 words used by Michael West for defining 18.000 words and 6.000 idioms in his New Method English Dictionary, written specially for the foreigner, Longmans, Green & Co, London 1935) — CS, II.

— Provenance of roots of constructed languages from ethnic languages-SC, II.

— Pronouns-CS, II, 6.

— Conjunctions-CS, II, 6.

— „Correlatives" (based on the 45 Esp „correlative" words) — CS, II, 6.

— Numerals-CS, II, 6.

— Clock-time-CS, II, 6.

— Word-formation: principles, affixes, and examples of derived words and of compounds-CS, III.

— Declension of noun and adjective-CS, IV.

— Declension of pronoun-CS, IV.

— Conjugation of verb-CS, IV.

Mallongigoj:

CS: Comparative Studies. FL, Foundations of Language.

LSA: Linguistic Society of America.

ms.: manuscript. pp.: pages

E: English. Esp: Esperanto: Esp'ido: Esperantido. F: French. G: German. I: Italian. L: Latin. R: Russian. S. Spanish. LSF: Latino sine flexione. Nov: Novial. Occ: Occidental

II. La eldonejo „Stafeto" dum la 60aj/70aj jaroj planis eldoni libron „Civilizo kaj lingvo" de Collinson. Laŭ informo de prof. Regulo Perez la manuskripto perdiĝis poŝtvoje.

Sed sendube ankaŭ de tiu manuskripto Collinson ja retenis kopion.

Dankema pro ĉiu ajn informo: D-ro Detlev Blanke, 1080 Berlin, Charlottenstraße 60, GDR

Poresperanta varbado kaj la vero

Lastatempe mi multofte ekhavas dubojn pri la korekteco de nia poresperanta varbado. Ĉu ĉiuj rimedoj estas permesataj por „kapti" novajn membrojn, por envicigi novulojn en niajn rondojn?

Mi dubas, ekzemple, pri la korekteco de nia ofte uzata argumento, ke Esperanto estas „facila lingvo". Ĝi ja nur posedas la 16 de d-ro Zamenhof donitajn gramatikajn regulojn! Kompare al tio la germana (laŭ „Duden") posedas 492! Ĉu nia argumento veras? Mi forte dubas! Certe, la germana posedas 492 regulojn. Antaŭ mi kuŝas la „Plena Analiza Gramatiko de Esperanto", verkita de Kolocsay kaj Waringhien. Tiu ĉi bonega verko ampleksans preskaŭ 600 paĝojn kaj ... 436 paragrafojn gramatikajn! (Mi ne volas paroli pri la multegaj rimarkoj kaj piednotoj!). Tial mi certas, ke, rilate al varbado, ni ne povas persisti pri nur 16 gramatikaĵoj de Esperanto.

„Relative facila lingvo" mi subskribus — pensu, ekzemple, al niaj aziaj samlingvanoj, kiuj venas el tute aliaj kulturoj ol ni eŭropanoj. Ili tre ofte devas klopodi eklerni la literojn de la Esperanto-aboco antaŭ ol ili povas komenci studi la bazan fundamenton. Krome, mi certas, la esprimo „facila lingvo" vekas tro malĝustajn esperojn pri rapida lernado. Okazas ne malofte, ke kursanoj post la tria, kvara instruhoro forlasas la kursojn, ĉar montriĝis al ili, ke Esperanto ankaŭ ne estas lernebla dumnokte, dumdorme. Estus pli oportune jam komence diri al ĉiuj lernemuloj: „Esperanto estas r e l a t i v e facile lernebla — tamen la lernado ne portas fruktojn sen via firma volo, vi devas konstante plulerni! Esperanto ne estas donaco, kiu estas atingebla sen daŭra lernado."

Antaŭ nelonge longjara esperantisto proponis uzi la sloganon: „Vojaĝu helpe de Esperanto! Vi nur bezonas unu lingvon!" Ĉu vere? Estas dezirinda celo, tutcerte. Do, ĉi-momente la vero alie aspektas. Provu uzi Esperanton ĉe iu ajn landlimo — vi nur hazarde povus trafi doganiston, kiu parolas la Lingvon Internacian. Scipovi ankaŭ aliajn lingvojn nuntempe ŝajnas esti bonvenaĵo. Tio ne signifas, ke ni rezignu pri disvastigo de nia ideo pri dua lingvo por ĉiuj homoj — kaj la dua estu Esperanto! (Mi ne devas argumenti, kial Esperanto, tion či ĉiu esperantisto tre bone scias).

La esprimo „facila lingvo" inter neesperantistoj ankaŭ vekas la impreson, ke Esperanto estas afero ne tute plenvalora. Oni jam čiam interligas la lernadon de iu fremda lingvo kun multaj penoj. Kaj ni „paradas en snoba maniero", ke Esperanto estas „facila lingvo" kaj „ellernebla dum malmulta tempo". Ĉu tio ne devas ŝajni al seriozuloj kiel mensogeto? Ĉu ni vere ne mensogas, se ni tiamaniere fanfaronas? Kial inter ni ankoraŭ ĉiam ekzistas t. n. „eternaj komencantoj"? Tio do ne povas esti bona argumento por „facila lingvo"!

Antaŭ kelke da tempo mi ellaboris porgazetaran materialon, en kiu mi ankaŭ argumentis „Esperanto estas facila lingvo". Spertulo atentigis min pri miaj tiurilataj penseraroj. Unue mi diris al mi, ke či tiu kritiko ne taŭgas kaj pravigeblas. Post pli longa pripensado mi nun sincere devas konfesi: Li tute pravas! Ni ne povas varbadi por la Lingvo Internacia helpe de duonveraĵoj! Ke ni devas varbadi, estas memkompreneblaĵo — sed honestaforme, efektive kaj sen dubaj argumentoj.

Joachim Schulze

„Voĉo de handikapuloj"

Jen la titolo de nova Esperanto-revuo, kiu aperas ekde 1984 en Jugoslavio kiel dumonata organo de la Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj.

Ĝin redaktas Dušan Adnadj (YU — 56227 — Borovo, Školska ul. 25, Jugoslavio). La 4-paĝa grandformata revuo prezentas temojn de la Asocio, literaturaĵojn, recenzojn k. s. La revuo estas ilustrita.

El Bulgario

Mi estis gasto de la 41a kongreso de BEA

Laŭ deziro kaj komisio de la prezidio de GDREA mi havis la eblecon partopreni la 41an kongreson de Bulgara Esperantista Asocio en Sofio. La kongreso okazis la 6an de julio en granda salono de la domo de Bulgara Komunista Partio. La delegitaro amplekSis entute 891 gekongresanojn el la tuta lando.

La organizo de la kongreso estis bonega. Ĉiuj materialoj estis presitaj: la raporto de CE de BEA pri la agado ekde la 40a kongreso, la nomaro de ĉiuj delegitoj, la rezolucio, la raporto de la Centra kontrola komisiono, tagordo, reglamento kaj programo, la propono pri ŝanĝoj kaj aldonoj en la statuto de BEA, informoj por la delegitoj ktp. Entute laboris 5 komisionoj (pri kontrolo de la mandatoj, pri la rezolucio, pri ŝanĝoj kaj aldonoj al la statuto, pri proponoj de novaj CE kaj CKK kaj pri okazigo de la elekto de novaj CE kaj CKK). La kongreso daŭris pli ol 10 horojn. La kongreson partoprenis reprezentantoj el 5 ladoj resp. 6 Esperanto-asocioj (GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando). El GDR partoprenis krom mi s-ino Ludmilla Hypius el Eisenhüttenstadt. La salutparoladon de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj voĉlegis k-do Evgeni Tuganov, konsilisto de la sovetia ambasado en Sofio. Mi salutis la kongreson en la nomo de GDREA akcentis precipe la bonajn kaj evoluantajn interrilatojn inter niaj asocioj kaj deziris al la kongreso grandan sukceson. La salutparolado estis akceptata per bona aplaŭdo.

La elstara kaj tre konata k-do Nikola Aleksiev malfermis la kongreson. Li i. a. atentigis pri la komplikita internacia situacio. Li menciis, ke krom la rusaj la bulgaraj esperantistoj estis inter la unuaj en Esperantujo kaj BEA ekzistas ekde la komenco de la jarcento (la 1a kongreso okazis 1907 en Veliko Tirnovo).

La ĉefparoladon faris la prezidanto de BEA, k-do Hristo Gorov (li kun k-do Aleksiev kaj Asen Grigorov antaŭ dekoj da jaroj fondis la Laboristan Esperantistan Asocion en Bulgario). Li parolis pri la signifo de la malarmado kaj pacbatalo, pri la konsekvenca pacpolitiko de Sovetunio kaj de la aliaj socialismaj landoj kaj pri la alvoko de la sovetia registaro al la popoloj kaj parlamentoj. Li menciis la 40-an datrevenon de la venko super la faŝismo kaj la konkurson de la bulgaraj esperantistaj kulturgrupoj omaĝe al tiu ĉi datreveno. Poste li pritraktis la grandajn ekonomiajn sukcesojn en Bulgario prepare al la 12a partio kongreso de BKP kaj la agadon de BEA. Inter la ĉefaj demandoj de la pasinteco kaj estonteco li precipe reliefigis la instruadon de Esperanto-instruistoj, la neceson eldoni lernolibrojn kaj vortarojn kaj la plilarĝigon de la movado. Li ankaŭ menciis, ke BEA nun ampleksas 9300 da orgarolado li emfazis la grandan subtenon al nizitaj esperantistoj. je la fino de sia pa- BEA flanke de la partio kaj de k-do Todor Jivkov mem.

K-do Dilbokov, membro de CK de BKP kaj vicprezidanto de la Nacia Konsilantaro de Patrolanda rFonto, k-do Gogov de CK de Dimitrova Junulara Komunista Unuiĝo kaj k-do Angelov, ĉefsekretario de Ministerio pri Popola Klerigo salutis la kongreson flanke de iliaj organizaĵoj resp. institucioj. Ili ĉiuj altestimis la agadon de BEA kaj esprimis sian opinion pri la granda signifo de Esperanto.

Diskutis 23 gekongresanoj. Ili raportis kaj pri siaj laborsukcesoj kaj sia agado kaj problemoj en la Esperanto-movado. Estis optimistaj, sed ankaŭ kritikaj diskutkontribuoj. Ekzemple k-do Ignev el Sofio akcentis, ke neniam ĝis nun kongresoj de BEA havis tiom bonajn kondiĉojn kiel la ĉijara, kaj k-do Georgi Litov interese parolis pri la granda signifo de la interkorespondado. Li ankaŭ faris citaĵon de Hans Borgward, kiu iam esprimis sian estimon pri k-do Georgi Dimitrov.

Dum la tagmanĝa paŭzo la tuta delegitaro inkluzive de la eksterlandaj gastoj komune iris al la proksime troviĝanta maŭzoleo de Georgi Dimitrov kaj honoris tiun ĉi elstaran reprezentanton de la laborista klaso, faman batalanton kontraŭ la faŝismo, unuan ĉefministron de PRB kaj helpanton de BEA per florkrono kaj minutdaŭra silento.

Dum la paŭzoj de la kongreso mi persone ankaŭ havis interesajn interparoladojn kun la reprezentantoj de BEA, kun multe da delegitoj pri diversaj temoj.

Je la fino de la kongreso la bulgaraj delegitoj elektis la novan Centran Estraron. La nova CE de BEA ampleksas 135 personojn, inter ili 73 malnovaj kaj 62 novaj membroj.

K-do Hristo Gorov estis reelektita kiel prezidanto de BEA kaj k-do Dimitir Papazov (iama sekretario) kiel ĝenerala sekretario.

Ekstere de la kongreso la gastoj kaj delegitoj havis la ĝojon vidi kaj aŭskulti la komedion „La milionulo" de Jordan Jovkov, prezentita de la Bulgara Esperanto-teatro kun la elstaraj Belka Beleva kaj Anani Anev kiel ĉefaktoroj kaj tre bonan solenan kongreskoncerton, prezentitan de bulgaraj esperantistaj artistoj. Post la kongreso BEA organizis por la eksterlandaj gastoj dutagan kaj tre interesan ekskurson tra la belega gastiga lando.

La partopreno entute estis bela kaj neforgesebla travivaĵo.

Manfred Arnold

Ab 1. 1. 86 werden folgende Presseerzeugnisse in die Postzeitungsliste aufgenommen und beim Post- u. Fernmeldeamt Falkenberg, Zentralvertrieb d. PZV, 7900 Falkenberg, Ubigauer Str. 4, abonnierbar:

1. „Pola Esperantisto", Best.-Nr. Z36885, 6,10 M für das Viertel-Jahresabonnement (vier Hefte jährlich).

2. „Budapeŝta informilo", Best.-Nr. Z0133/0977, 5,40 M für ein Viertel-Jahresabonnement (12 Hefte jährlich).

3. „Juna amiko", Best.-Nr. Z0230/1318, 9,30 M für ein Jahresabonnement (drei Hefte jährlich).

Um diese Zeitschriften ab 1986 zu erhalten, müssen Sie die Bestellungen bis zum 10. 11. 1985 vorgenommen haben. Geben Sie auch unbedingt die erwähnten Bestell-Nummern an.

ISEU en Veliko Tarnovo

Jam la trian fojon la Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista pocio en Veliko Tarnovo aranĝis sesion de la **Internacia Somera Eszeranto-Universitato,** kiu fondiĝis 1983. Ĉifoje, de 20. — 27. 7. 85 partoprenis pli ol 100 bulgaraj esperantistoj kaj du ĉeĥoj, kvar germanoj, unu jugoslavo kaj unu polino la aranĝon.

Maria Pejkova, Olga Cankova kaj Stefan Raŝkov, ĉiuj de la Distrikta Estraro, aparte meritiĝis pro la organizado kaj funkciado de la sesio. Ĝin malfermis la rektoro en la aŭlo de la Universitato „Kiril kaj Metodij". La solaj eksterlandaj prelegantoj estis Wera Dehler („El la historio de la faklingva normigado", „Kiel plej efike uzi la lingvon"), d-ro Erich-Dieter Krause („Evoluo de la leksiko de Esperanto", „Neologismo", lumbildprelego pri Birmo kaj Indonezio) kaj la subskribinto („Evoluo de Esperanto", „Instruoj el la historio de la planlingvoj"). Oni aŭskultis plue jenajn prelegojn de bulgaraj scienculoj kaj esperantistoj: „La Tarnova skolo de literaturo kaj la slavaj literaturoj" (doc. Nevjana Donĉeva), „La interlingvistiko — scienco eksperimenta" (Prof. St. Ĝuĝev), „La lingva deveno de Esperanto" (Kunĉo Valev), „Tiklaj lingcaj problemoj en Esperanto" (Neno Janev), „La Esperanto-propagando" (Donĉo Ĥitrov), „Komplekso de malplivaloro ĉe la lingvoparolantoj" (prof. St. Ĝuĝev), „La komputilspecoj, evoluo, aplikado" (Doc. St. Stojĉev), „Algoritmoj kaj programigo" (Doc. St. Stojĉev), „Pontoj de la sano" (Prof. K. Popoc), „Mezepoka Tarnovo — ĉefurbo de Bulgario" (Petar Slavĉev). Krome la partoprenintoj vizitis la Ŝipkamonumenton, la metiistan vilaĝon Etâra, Gabrovo kaj la monaĥejon Arbanasi.

Sendube ISEU havas i. a. jenajn gravajn efikojn: Ĝi klerigas la aŭskultantojn popularscience, demonstras la fakan aplikon de Esperanto kaj tiel donas kontribueton al la evoluado de la faka lingvo. La scienca nivelo de la prelegoj estis diversa, same la lingva nivelo kaj tema percepto de la aŭskultantoj. Sed tio verŝajne estas neevitebla kaj reduktebla dum la estontaj sesioj. Nepre partoprenu tiun ĉiujare reokazontan aranĝon pli da eksterlandaj aŭskultantoj kaj prelegantoj. Tion certe meritas la aranĝo. Informojn pri la 4a sesio 1986 jam nun petu ĉe „Esperantista Societo Lumo", BG—5000 Veliko Tarnovo, P. K. 121, Bulgario.

D. Blanke

Jubilea scienca sesio

La 12-an de aprilo en Veliko Tarnovo (BG) okazis jubilea scienca sesio, dediĉita al la 120a datreveno de la naskiĝo de Ĥristo POPOV, popola instruisto, sociaganto, pioniro de Esperanto. Prelegis generalo Konstantin Ĥristov, Olga Cankova, Rosina Dankova, Angel Tonov, prof. d-ro Kiril Popov, Pavlina Popivanova, Virjinia Kirĉeva, Marin Kovaĉev kaj Tanja Minĉeva.

Rememoris pri sia patro, la filino: Maria Kirĉeva. La loka biblioteko eldonis broŝure bibliografion pri Ĥristo Popov (1865 — 1945).

La prezidanto de la Asocio de bulgaraj sciencistoj, prof. Nikola Nikolov faris konkludan parolon. En la presejo de la loka Universitato „Kiril kaj Metodij" oni publikigos la materialojn de la sesio en speciala jubilea libro.

Posttagmeze en Dolna Orjaĥovica, naskiĝloko de Ĥr. Popov, okazis solena kunveno. La loĝantaro samtempe celebris la 85-jaran datrevenon de la naskiĝo de Kiril Ĥristov, filo de Ĥristo Popov, antifaŝisto-esperantisto, murdita en 1923. Festparolis generalo Konstantin Ĥristov. La gastoj vizitis la domon de Ĥristo Popov, kie en 1982 oni aranĝis ekspozicion kaj solene inaŭguris memorplaton.

Olga Cankova

KONTRAKTO

Inter Esperantista societo „Lumo" en Veliko Târnovo — Bulgario kaj Esperanto-grupo de GDREA ĉe Kutlurligo de GDR en la urbo Stralsund pri diversflanka kunlaborado kaj amikaj rilatoj.

La kontrakto havas la sekvajn ĉefajn celojn:

1. Profundigi la amikajn rilatojn inter la esperantistoj el Stralsund kaj Veliko Târnovo per regula korespondado pri la laborplanoj, la agado rilate al la Esperanto-kursoj, organizaj demandoj, E-aranĝoj k. t. p.
2. Interŝanĝi spertojn pri la E-movado en ambaŭ urboj.
3. Aktivado de la E-agado de ambaŭ societoj por stimulado de la progreso de Esperanto.
4. Interŝanĝo de salut — kaj bondezirkartoj okaze de politikaj kaj kulturaj festotagoj nome:
   Por Stralsund: 1. I; 8. III; 1. V; 7. X; 15. XII; por Veliko Târnovo: 1. I; 8. III; 22. III — festo de V. Târnovo; 1. V; 9. IX. — nacia festo de Bulgario; 7. XI; 15. XII.
5. Interŝanĝo de E-revuoj, E-gazetoj, E-libroj eldonataj en ambaŭ landoj, fotajoj, gramofondiskoj, sonbendoj, bildkartoj k. a.
6. Organizi dum la jaro prelegojn, ekspoziciojn, klubvesperojn kaj montrofenestrojn okaze de gravaj momentoj el la vivo de ambaŭ societoj kaj landoj per interŝanĝo de artikoloj kaj aliaj materialoj.
7. Organizi konstantan standon pri „Niaj Stralsundaj/V. Târnovaj amikoj.
8. Konstante propagandi Esperanton, plimultigi la nombron de la membroj, agadi por paco.

Tiu ĉi kontrakto daŭros du jarojn. Ĝi ekfunkcios ekde la 1-a de majo 1985.

Je la nomo de Esperantista societo „Lumo" en Veliko Târnovo: Maria Pejkova	Je la nomo de Esperanto-grupo de GDREA ĉe Kulturligo de GDR en urbo Stralsund: Hans-Joachim Borgwardt
Veliko Târnovo,	Stralsund,
la 17-an de aprilo 1985	la 17-an de aprilo 1985

Tri gravaj libroj

— **Papazov, D. (Red.): Bulgara Esperantista Asocio — Aktiva batalanto por paco, internacia kompreniĝo kaj socia progreso. Referajoj, prezentitaj dum la scienc-praktika konferenco „75 jarojn BEA", okazinta 25. — 26. 9. 1982 en urbo Veliko Târnovo. Sofio 1982 (BEA), 350 p.**

— **Murgin, C. (Red.): Esperanto v služba na rodinata. Jbihen sbornik. Sofio 1983 (BEA), 130 p. (en bulgara lingvo).**

— **Papazov, D. (Red.): Septembra ribelo 1923 — heroa batalo de la bulgara popolo kontraŭ la faŝismo. Referajoj, prezentitaj dum la scienc-praktika konferenco, dediĉita al la 60a datreveno de Septembra Ribelo 1923, okazinta 11. — 12. 6. 1983 en urbo Stara Zagora. Sofio 1983 (BEA), 135 p.**

Bulgara Esperantista Asocio jam dum kelkaj jaroj konsiderinde aktivas sur la kampo de historiaj esploroj de sia landa Esperanto-movado. Tion plifaciligas la fakto, ke ankoraŭ aloj de la bulgara Esperanto-movado aktivas multaj veteranoj el la laboristmovada kaj burĝa kaj povas kontribui per siaj rememoroj. Kompreneble plej aktivaj estas la iamaj membroj de la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA). Sed ja ne sufiĉas la ekzisto de atestantoj de historio. Oni ankaŭ devas trovi metodojn por prezenti memorojn kaj dokumentojn kaj — laŭ kriterioj de la historioscienco — prilabori ilin. La bulgaroj trovis interesan formon, por stimuli tion: la scienc-praktikaj konferencoj. Dum tiuj konferencoj oni aŭskultigas aron da prelegoj kaj referaĵoj pri la traktata kadrotemo. La konferenco mem estas aktiviga celo por multaj finfine skribi ion pri la historio. Kaj post la konferencoj BEA eldonas la materialon libroforme. La tri titoloj estas rezulto de tiaj konferencoj. La unua volumo pri la konferenco okaze de la 75a datreveno de la fondo de BEA entenas 55 materialojn, inter ili 37 prelegojn. Ili traktas la plej diversajn aspektojn de la historio de la bulgara Esperanto-movado. Ni trovas superrigardojn pri aktivecoj en unuopaj teritorioj, analizojn pri la agado de unuopaj grupoj, pri la Esperanta gazetaro, BEA-kongresoj, spertoj de Esperanto-korespondado, ligoj de bulgaraj esperantistoj al eksterlando kaj personaj rememoroj de veteranoj. Tre forta estas la prezento de la aktivado de la komunistaj kaj patriotaj esperantistoj.

La dua tiolo fakte estas bulgarlingva elekto el la unua sed ankaŭ entenas similenhavajn kontribuojn, kiuj mankas en la esperantlingva volumo. La libro redaktita de Murgin evidente celas la neesperantistan publikon en Bulgario. Tio estas tre saĝa, ĉar historiistoj, instruistoj kaj aliaj historie kaj pri Esperanto interesitaj homoj tre klare komprenos la forte progresemajn karakteron kaj tradiciojn de la bulgara Esperanto-movado. La volumo pri la Septembra Ribelo entenas 17 kontribuojn, inter ili kelkajn bonegajn superrigardojn pri tiu grava evento de la bulgara historio kaj la partoprenon de esperantistoj en ĝi.

Oni povas esperi, ke BEA daŭrigos la eldonon de tiaj baze gravaj materialoj.

D. Blanke

Kooperativa Esperanto-Sekcio de Bulgario informas:

Ekzistas Centro por Scienc-Esplora kaj Inĝenier-Enkonduka Agado ĉe la Centra Kooperativa Unuiĝo — Sofia, sub la nomo KOOPPROGRES. Ĝia ĝenerala direktoro — profesoro Nikola Vâlev estas preta utiligi Esperanton por profesiaj celoj. La Kooperativa Scienca Centro prilaboras diversajn temojn, kiel:

— teoriaj demandoj de la kooperativa movado;
— proponoj por enradikigo de plej novaj atingoj de la scienc-teknika progreso en la kooperativajn agadojn;
— ekonomiaj kaj scienc-teknikaj analizoj, prognozoj kaj pricelaj kompleksaj programoj por social-ekonomia disvolvigo, kooperativa financado kaj kreditado;
— perfektiĝo de la kooperativa administrado, planado kaj organizado;
— vojoj por plialtigo de la efikeco, rentableco kaj kvalito de la kooperativaj agadoj;
— perspektivoj por disvolviĝo de la eksterlanda-ekonomia agado;
— problemoj de la Internacia Kooperativa Movado, de la integrado inter la kooperativoj el la socialismaj landoj, profundigo de la kunlaboro inter la kooperativoj el aliaj landoj de la tuta mondo.

La interesiĝantoj bonvolu skribi al: Bulgario, Sofia, str. „G. Rakovski" 99, CKU — Koopprogres.

Sekretario de KES: D. Mutušev
Prezidanto de KES: M. Milanov

Prospekto pri Veliko Târnovo

Ilustritan prospekton pri la iama ĉefurbo de Bulgario, Veliko Tirnovo, eldonis la Distrikta Estraro de BEA. Petu ĝin de „Esperantista Societo Lumo", BG—5000 Veliko Târnovo, P. K. 121.

Forpasis Asen Grigorov (1903 — 1985)

Dum junio[1]) en Sofio forpasis unu el la plej popularaj bulgaraj esperantistoj. Asen Grigorov estis elstara laborista esperantisto, vortaristo, redaktisto, poeto kaj instruisto. Inter aliaj li redaktis la faman „Nuntempa Bulgario". Post la liberiĝo li okupis gravajn ŝtatajn postenojn kaj estis i. a. sekretario de Georgi Dimitrov[2]). Pro lia elstara kontribuo al la pliprofundigo de amikeco inter bulgaraj kaj germanaj esperantistoj, Asen Grigorov estis distingita per la honorinsigno de GDREA.

La esperantistoj de GDR konas la grandan kontribuon, kiun donis la forpasinto al sia patrolando, al la internacia laborista movado, al Esperanto[3]). Ni gardos lian memoron.

CE GDREA

[1]) Bedaŭrinde ni ne eksciis la konkretan daton de la forpaso.
[2]) Vidu en GDR-Paco 1982
[3]) Vidu „der esperantist" 61/62 (5—6 1973), p. 25—28.

Sovetiaj esperantistoj en GDR

Unuan fojon en la historio de la rilatoj inter ASE kaj GDREA sovetia Esperanto-grupo restadis en GDR. De la 16a ĝis 28a de junio 1985 33-kapa grupo, mebroj de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, vizitis nian landon okaze de la 40a datreveno de la liberiĝo. La grupo, al kiu apartenis reprezentantoj el 10 sovetiaj respublikoj, estis gvidata de la respondeca sekretariino de ASE, k-dino Lidia Ŝanina. La grupo estis turista, tio signifis, ke ĝin organizis la Societo por Amikeco inter USSR kaj GDR kunlabore kun ASE. Sur la flanko de GDR la partneroj estis la Societo por Germana-Sovetia Amikeco kaj la vojaĝoticejo de GDR kaj GDREA. Al la grupo apartenis multaj bone konataj esperantistoj, amikoj de GDR, inter ili Paŭlo Jegorovas, vicprezidanto de la Litova Filio de ASE kaj Avetis Patatjan, la (energie tostinta) prezidanto de la Esperanto-Klubo en Jerevano. La grupo de ASE dum sia restado konatiĝis kun la urboj Berlin, Dresden, Weimar, Erfurt, Magdeburg kaj Potsdam kaj havis multajn amikajn renkontiĝojn kun lokaj esperantistoj.

Apartaj solenaj renkontiĝoj okazis en Berlin, Dresden, Weimar kaj Magdeburg. En Berlin, la 18an de junio, la salono estis plenplena. Venis pli ol 50 esperantistoj el la ĉefurbo por saluti la sovetiajn esperantistojn. Post prelegoj de d-ro Detlev Blanke, s-ino Sonnenberg (Societo por Germana-Sovetia Amikeco) kaj Avetis Patatjan pri la signifoplena venko de Soveta Unio kontraŭ la hitlera faŝismo Manfred Arnold kaj Fritz Wollenberg recitis poemojn de Johannes R. Becher. Tute nova artisto por ĉiuj estis Klaus Ebert, kanzonisto, kiu kantis du ruslingvajn kantojn kaj du kanzonojn tradukitajn en Esperanto, kiujn li en la germana originalo mem verkis kaj komponis. Lia Esperanto prononco estis mirinde klara kaj bela. Jen nova talento ankaŭ por aliaj artaj programoj.

La sovetia grupo prezentis tre riĉan kulturan programon kun kanzonoj, kantoj, recitoj kaj monologoj. Oni aŭdis reprezentantojn el preskaŭ ĉiu respubliko. Varma aplaŭdo dankis al la prezentintoj. Valoras mencii la interesan filatelan eksponaĵon, kiun prezentis Aleksandro Kalaŝnikov.

La sovetiaj esperantistoj disdonis la plej novan esperantlingvan materialon de APN (vidu ĉi-paĝe kaj afiŝojn pri la venko kaj pri la 12a monda junulara festivalo. Fine ni ne forgesu, ke la grupo transdonis al GDREA luksan memfaritan porcelanan vazon, kun la du ŝtatblazonoj kaj omaĝa teksto kaj krome imponan ruslingvan enciklopedion pri la dua mondmilito. La tuta vespero en Berlin estis unika, bunta kaj harmonia demonstro de firma sovetia-germana amikeco.

D. B.

Esperanto en Sovetunio

Post la Moskva Festivalo de Junularo kaj Studentoj de 1957 la Esperanto-movado en Sovetunio ricevis novan impulson. Kreskis nombro de adeptoj de la Internacia Lingvo kaj en 1979 estis kreita Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). Dum 5 jaroj de la ekzisto de ASE kvanto de la kluboj grandiĝis kelkoble. Inter la plej grandaj kaj aktivaj oni povas mencii la klubojn en Moskvo, Leningrad, Krasnodar, Krasnojarsk, Kujbiŝev, Magadan, Samarkand, Vladivostok. ASE-filioj estas kreitaj en Armenio, Estonio, Kartvelio, Latvio, Litovio, Ukrainio kaj ankaŭ en Leningrada provinco kaj Krasnodara regiono de RSFR. Ĉiujare estas organizataj dekoj da tutlandaj kaj regionaj renkontiĝoj kaj tendaroj. La sovetiaj esperantistoj partoprenas ankaŭ en internaciaj aranĝoj, inkluzive IJK kaj UK. Multaj eksterlandaj esperantistoj vojaĝas al Soveta Unio. Aprile 1984 Moskvon vizitis s-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA.

En Sovetunio oni eldonas sufiĉe multe en kaj pri Esperanto. Tio estas interlingvistikaj studoj en Tartu kaj Moskvo, publikaĵoj de la Eldonejo „Nauka", ekzemple, la libro de la prezidanto de ASE, M. I. Isajev „Jazik Esperanto". Kun eldonkvanto de 100 mil ekzempleroj estis reeldonita „Esperanta-rusa vortaro" de E. A. Bokarjev.

En Estonio kaj en kelkaj aliaj respublikoj oni regule eldonas literaturaĵojn en Esperanto. Ankaŭ la Eldonejo de Presagentejo Novosti (APN) en Moskvo komencis eldoni soci-politikajn literaturaĵojn en la Internacia Lingvo.

(El broŝuro „Kio estas USSR?")

Tri novaj broŝuroj el USSR

La Eldonejo kaj gazetara agentejo Novosti daŭrigas la eldonadon de esperantlingvaj materialoj. Okaze de la 12a Monda Festivalo de la Junularo en Moskvo aperis 36-paĝa kolorfote ilustrita broŝuro de **Vladimir Aksjonov „Renkonte al la 12a tutmonda festivalo Moskvo 1985".** Ĝi enhavas jenajn ĉapitrojn: Junularo de la planedo gaste en Moskvon!, Fideleco al la festivalaj tradicioj, Rolo de la sovetia junularo en la socipolitika kaj ekonomia evoluo de la lando, Pacmarŝo de la sovetia junularo, Al la Festivalo prepariĝas la tuta lando. Krome la broŝuro entenas alvokon pro partopreno de esperantistoj en la festivalo. Tradukis Viktor Arolovič kaj Elena Ŝevčenko. La dua broŝuro estas 32-paĝa kaj titolas **La sendevia kuro de la paco kaj progreso. Materialoj de la Ekstervica Plenkunsido de CK KPSU la 11an de marto 1985, APN, Moskvo 1985.** La broŝuro entenas: Komuniko pri la Plenkunsido de Centra Komitato de Komunista Partio de Soveta Unio, Parolado de Ĝenerala Sekretario de CK KPSU M. S. Gorbačov, Parolo de Gorbačov en la funebra mitingo sur Ruĝa Placo la 13an de marto 1985. Tradukis Ludmila Novikova kaj Viktor Arolovič. La tria materialo estas tre bele kaj parte kolore presita faldfolio en formato A2 (aŭ faldite en A5) kun la titolo **„Niaj infanoj neniam spertu terurojn de milito."** APN, Moskvo 1985. Por ĉiuj materialoj sendu amasajn mendojn kaj viajn rimarkojn kaj opiniojn al: Izdatelstvo APN, SU—107082 —Moskva, Bolŝaja Počtovaja 7.

Du impresaj afiŝoj el Moskvo

Daŭrigante la aperigon de aktualaj politikaj materialoj, la sovetia eldonejo APN eldonis du grandajn afiŝojn: multkolora afiŝego pri la Monda Festivalo de la Junularo en Moskvo ĉi-jare kaj faldafiŝojn pri la venko super la faŝismo kun multaj historiaj fotoj.

Kelkaj pensoj pri la kultura vaiero de la Esperanto-lernado en familioj

En subdistrikto Prenzlau (ĉe Neubrandenburg) ni ekde septembro 1984 sukcese klopodis atingi, ke ankaŭ kelkaj gepatroj de niaj gelernantoj-rondetanoj lernas Esperanton.

Tio certe ne estas nova ideo. Ankaŭ en aliaj lokoj gepatroj kune kun siaj geinfanoj lernas Esperanton. Sed ni elektis iomete alian vojon:

a) La junaj Esperanto-gelernantoj varbis siajn gepatrojn.

b) Tiuj gepatroj ĝustiĝis la kerno de nia plenkreskula grupo.

Kiuj avantaĝoj rezultis el tiu-ĉi laboro kun E-familioj?

1. Ni povis konstati, ke gepatroj kaj geinfanoj sin reciproke instigas kaj kuraĝigas dum la hejma komuna lernado: Fluktuadon ĝis nun ni ne havas, neniu forestas dum la semajna E-instruado senkaŭze.

2. La rezultoj de la lernado pliboniĝis pro komuna lernado: Ekzistas sekreta konkurso a) inter familanoj kaj b) inter familioj. En la familioj komenciĝis la praktikado de E-o dum ĉiutaga vivo, kio kuraĝigas la gefamilianojn, ankaŭ konversacii dum la kursoj.

3. Kreskis la intereso pri movadaj problemoj:

I. a. oni pli emas aboni, aĉeti kaj legi Esperanto-literaturon, korespondi internacie, gastigi eksterlandajn gastojn kaj helpi multflanke ĉe preparado de diversaj aranĝoj.

4. Esperanto estas integrita en la familian vivon: Ni sukcese integras Esperanton en la kadron de jam ekzistantaj hobioj de la Esperanto-familioj kaj inverse, ni uzas las potencojn de tiaj ŝatokupoj por plivigligi nian kluban vivon. Ekzemploj:

— La daĉanoj organizis printempan ĝardenan feston por E-familioj.
— Esperantistino — subakviĝantino lumbildprelegis pri sia speciala familia hobio.
— Ni planas, ĉi-jare kaj venontjare komune feriadi
— Unu patro ebligas uzi la uzinan kegloludejon.

5. La komuna familia hobio Esperanto plilarĝigas la intelektan horizonton: Profundiĝas la ekkono, ke ankaŭ estas necese kunlabori sur aliaj kulturpolitikaj kaj sociaj terenoj.

Pruvoj:

— Ĉiuj Eo-familianoj membriĝis en Kulturligo de GDR.
— La gepatroj aktive subtenis la agadprogramon en preparo al la 40a datreveno de la liberigo de germana popolo de la faŝismo kaj la 40an fondiĝdatrevenon de Kulturligo.
— Unu ero de nia agadprogramo i. a. estas, komune kun la pentrorondo de granda uzino „Armaturenwerk" ornami subpontan muron en nia urbo per infandesegnaĵoj pri la temo „Ni infanoj bezonas la pacon".

6. Oni povas resumi:

La komuna familia hobio Esperanto estas inda vojo por

— plialtigi la socian konscion de la Esperanto-familianoj,
— plibonigi la interfamilianojn rilatojn,
— stabiligi la grupojn,
— plivigligi la kluban vivon,
— veki la fieron pri komunaj sukcesoj, memfidon kaj kreivan aktivecon.

Edeltraud kaj Achim Zettier, Prenzlau

Kial ne al Lančov?

Vi certe legis nian artikolon pri la „Somera Esperantista Tendaro" (SET), kiu ĉiujare okazas en belega regiono ĉe la valbaraĵo Vranov (ĉe Znojmo). Tiu tendaro kun ĉirkaŭ 20 lignaj kabanetoj kaj ĉiuj ekipaĵoj necesaj por internacia kampadejeto estas propraĵo de la Esperanto-klubo en Třebič.

Komence de julio ĝis meze de aŭgusto ĉiujare dum 3 etapoj (po 2-samajnaj) renkontiĝas ĉirkaŭ 120 esperantistoj (ofte ontaj) por eklerni la lingvon aŭ pliperfektiĝi. Ekzistas grupoj por komencantoj, progresintoj, konversaciantoj, tradukistoj kaj instruistoj. La animo de la tuta entrepreno estas Pavel Sittauer el Třebič, kiu kun kelkaj fervoruloj antaŭ pli ol 30 jaroj fondis la kampadejon.

Ĉi-jare mi havis la eblecon persone vidi la tutan. Ĝi estas vere rekomendinda, aparte, se tien veturos homoj kun mezbonaj aŭ bonaj lingvoscioj aŭ — almenaŭ — kun la forta volo lerni la lingvon. Tro da nelernemaj hazarduloj tamen povas fuŝi la etoson kaj seniluziigi tiujn, kiuj volas lerni.

Do — bv. relegi la detalajn informojn pri SET en „der esperantist" n-ro (124/1984), p. 40—41 kaj . . . varbi aliĝojn por 1986.

D. Blanke

Renkontiĝo kun esperantistoj el Usono kaj Aŭstralio

La 28an de julio 1985 en Berlin (GDR) ĉ. 30 esperantistoj el Berlin renkontiĝis kun vojaĝgrupo de 25 usonaj kaj aŭstraliaj esperantistoj, kiuj traveturis GDR survoje al la 70a UK en Aŭgsburgo/FRG.

9a konferenco en Stralsund

La 9a konferenco de la norddistriktaj organizaĵoj de GDREA okazis la 18an de majo 1985 en Stralsund, omaĝe al la 40a datreveno de la liberigo. Partoprenis 60 esperantistoj, inter ili du gastoj el Szczecin. Aparte interesa estis la prelego de d-ro Hans Eichhorn, direktoro de la psikiatria kliniko en Ueckermünde, pri la historio de la psikiatrio en norda Germanio kaj nuna norda parto de GDR. Li i. a. informis pri la misuzo de la psikiatrio fare de faŝistoj en koncentrejoj. La partoprenintoj akceptis rezolucion, en kiu ili substrekis la signifon de la historia ŝanco de 1945 kaj esprimis sian subtenon por la porpaca politiko de la socialismaj ŝtatoj. La loka radiostacio en Rostock donis informon.

La 10-aj Esperantaj Tagoj de Bydgoszcz

Dum IFER '85 mi aŭdis pri la konkurso de Radio Polonia „La rolo de turismo en internaciaj proksimiĝo kaj interkompreniĝo". La temo interesis min, kaj mi forsendis konkursajon al Varsovio.

Kiel granda estis mia surprizo kaj ĝojo, kiam mi gajnis premion: senpagan partoprenon en la 10-aj Esperantaj Tagoj de Bydgoszcz (3. — 7. 6. 85)! Dank' al la helpo de multaj homoj — esperantistoj kaj ne-esperantistoj — mi ekveturis nur unu semajnon post kiam mi ricevis la invitilon.

La E-aranĝo iĝis granda travivaĵo por mi. Unu tago de la kunveno estis dediĉita al la konkurs-temo. La sep ĉeestintaj laŭreatoj — el Belgio, Finnlando, GDR, Pollando (2), Sovetunio kaj Svedio — laŭtlegis siajn kontribuojn, kaj poste oni pridiskutis ilin. Komuna al ĉiuj estis la ideo, ke la homoj el la diversaj landoj devas kunlabori por forigi gravegajn danĝerojn de la homaro kaj por formigi la pacon. Por kunlabori ili devas koni unu ia alian plejeble bone, kaj por atingi tion, la turismo povas helpi. La temaro etendiĝis de alproksimiĝo en internaciaj tendaroj ĝis la akiro de lingvokonoj dum kuraca E-feriado, de Esperantotur ĝis la rolo de ordinaraj vojaĝ-agentejoj.

Dum la sekvaj tagoj okazis ankoraŭ multaj aliaj E-aranĝoj: urbrigardo kaj florkronmetado omaĝe al viktimoj de la dua mondmilito, lingva ekzameno por la vojaĝontaj al la 70-a UK,
prezentiĝoj de pluraj ensembloj
hejma kunveno en privata E-klubo,
balo de amikeco.

Plej multe impresis min la gastamo de la organizintoj, la samrangigo kaj kamaradeco de ĉiuj ĉeestintoj, el kiu ajn lando ili venis.

Estis mia unua vizito de tia internacia aranĝo. Mi tre ĝuis ĝin kaj provos denove ĉeesti en similaj aranĝoj.

La sekva konkurso havas la temon „La rolo de Esperanto en internacia turismo". Ĉu eble ankaŭ vi partoprenos?

Gerda Häusler

AKTUALA KOMPUTIKO

En marto 1985 aperis la unua numero de periodaĵo Aktuala Komputiko. Ĝi estas internacia fakrevuo pri nuntempaj esploroj en la diversaj fakoj rilataj al komputiloj kaj uzo de komputiloj. Ĝi bonege kompletigas la jam ekzistantan INTERNACIAn KOMPUTADOn, parolantan al pli larĝa publiko („ne nur por komputistoj"), celantan unuavice disvastigi la komputadrilatan kulturon kaj prezenti la nunan situon de komputado en unuopaj landoj. Jen citaĵo de la antaŭparolo de la eldonanto, Christian BERTIN: „Mi ne riskas monon en tiu faka revuo. Mi ne deziras havi abonantaron, ĉar ties administrado estas tro temporaba. Mi havas eblecon por rapide kaj malmultekoste eldoni malgrandan nombron da ekzempleroj, sekve tio tute taŭgas por faka revuo en Esperanto, ĉar ne multaj personoj aĉetus ĝin, sed plej grave: ekde nun la fakuloj povas senhezite verki en Esperanto, iliaj artikoloj, se ili kontentigas bazajn postulojn, aperos en Aktuala Komputiko. Tiel mi esperas esti rompinta la diablan cirklon: manko de abonantaro implicas mankon de revuo, kiu implicas mankon de verkado de fakuloj, kiu implicas malprosperon de (faka) lingvo."

La revuo estas. 50 paĝa (A/5). Aperas 4 numeroj. Oni povas mendi ĉe Christian BERTIN, C. C. E. T. T. AIS, Rue du Clos Courtel B. P. 59. F—35510 CESSON-SEVIGNE.

La eldonanto atendas novajn artikolojn por aperigi ilin en la sekvantaj numeroj de AKTUALA KOMPUTIKO. Tiu iniciato estas vere utila, meritas la apogon de la tutmonda komputistaro.

d-ro Péter BROCZKÓ

La Esperantista Laboristo jubileas

Sub la supra titolo la unuan fojon aperis E-revuo en 1920, en Parizo, kiel organo de FEO (Laborista Esperantista Federacio). En septembro 1936, post la sukceso de la maldekstraj partioj en la baloto kaj en la etoso de la tiama epoko, ĝi fariĝis bulteno de la Fédération Esperantiste du Travail (FET). Post kongreso de unuiĝo inter FEO kaj FEP (Proleta Esperantista Federacio) — franca sekcio de IPE — la revuo Esperantista Laboristo aperis ĉiumonate ĝis septembro 1939.

Speciala numero aperis en marto 1945, anoncante la unuiĝon de francaj esperantistoj en unu granda E-asocio (UEF, Unuiĝo de Francaj Esperantistoj), sed la sekvo ne estis kontentiga.

En 1946, areto de fervoraj FET-anoj decidis reaperigi la revuon „La Laborista Esperanto", kun nova aspektc. Kunlabore kun belgaj, kaj svisaj kamaradoj ĝi fariĝis vere progresema internacia revuo. Ĝi multe kontribuis al la fondiĝo de Mondpaca Esperantista Movado. Ĝi ĉesis fine de 1958, pro financaj kaŭzoj.

Post 16jara silento „La Esperantista Laboristo" reaperis en mimeografita formo, 10-foje jare. Jam de 10 jaroj ĝi estas la sola Esperanta informilo en Francio, kiu alvokas esperantistojn kune kun la francaj neesperantistaj organizaĵoj al lukto por paco.

Gratulon al niaj fervoraj samideanoj, kiuj en aprilo 1985 aperigis la 100-an numeron de „La Esperantista Laboristo"!

Nova sovetia filmo en Esperanto

„Vivaj akvoj de Litovio" nomiĝas 30-minuta kolora sonfilmo pri la naturbelajoj de Litova Soveta Respubliko. La filmo estas 16 milimetra, lumsona. Distriktaj kaj subdistriktaj estraroj de GDREA mendu ĉe la Centra Estraro.

TRADUK-KONKURSO 1984

Finiĝis la dua „traduk-konkurso" en „der esperantist". Ankaŭ dum la jaro 1984 oni havis eblecon per diversaj taskoj pruvi sian lingvoscion. La unuopaj taskoj vere ne estis facilaj. Tial ni estis agrable surprizitaj, kiel bone iuj majstris la tradukadon.

Entute partoprenis 34 personoj, inter ili 4 eksterlandanoj. Tre kore ni gratulas al s-ro Ulrich Becker el Berlin, kiu gajnis la tutjaran konkurson. Jen la tutjara rezulto:

1. Ulrich Becker, Berlin — 213 poentoj
2. Gerhard Hornbogen, Weimar — 196 poentoj
3. E. + H. Plümecke, Magdeburg — 181 poentoj
4. Otto Möller, Heiligenstadt — 180 poentoj
5. Brunhilde Stief, Neustrelitz — 178 poentoj

En la unuopaj taskoj gajnis:

Tasko 1, 3 kaj 5 — Ulrich Becker
Tasko 2 — Gerhard Hornbogen
Tasko 4 — Adolf Staňura
Tasko 6 — Zdeněk Hršel

Ankaŭ en tiu ĉi jaro okazas sur la paĝoj de „der esperantist" denove nia „traduk-konkurso". Multaj, kiuj jam partoprenis en la antaŭaj jaroj denove partoprenas, sed ankaŭ multaj novaj. Tio certe estas signo, ke la konkurso plaĉas.

Ni atendas ankaŭ vian partoprenon.

Dieter Berndt

TRADUK-KONKURSO 5/85

Das künstliche Herz

Forschungskollektive in aller Welt befassen sich vorrangig mit wissenschaftlichen Arbeiten zur Bekämpfung der häufigen und gefährlichen Herzkrankheiten. Neue Medikamente, neue Operationstechniken, neue diagnostische Geräte wurden entwickelt und werden bereits zum Wohle des Patienten eingesetzt. Die Zahl der Herzoperationen in den herzchirurgischen Zentren nimmt ständig zu. Wie wird es in der Zukunft weitergehen?

Sowjetische, japanische, amerikanische, deutsche, österreichische Wissenschaftler und Forschergruppen in anderen Ländern arbeiten intensiv an der Entwicklung eines Herzens, das als mechanisch betriebene Pumpe in den Brustkorb verpflanzt werden kann und das geschädigte Herz ständig oder zeitweilig ersetzt. Ein „künstliches Herz", das außerhalb des Organismus „schlägt", ist mit der Herz-Lungen-Maschine bereits in vielen Kliniken einsatzbereit — aber natürlich nur für kurze Zeit.

Im Tierversuch, an Kälbern, hat das künstliche Herz seine prinzipielle Bewährungsprobe bereits bestanden. Die Tiere überlebten einige Zeit mit diesem Herzapparat. Dennoch ist die Entwicklung keineswegs abgeschlossen. Kein Zweifel besteht jedoch, daß dereinst einmal ein künstliches Herz verfügbar sein wird, das zeitweise oder über längere Zeit die Herzfunktion übernehmen kann. Lange Zeit wird noch verstreichen, bis dieses Herz annähernd die Leistungsfähigkeit, Sicherheit, Präzision und Anpassungsbreite des natürlichen Herzens erreicht. Zur Entlastung der Herzarbeit bis zur Erholung des Herzen, vor und nach Operationen u. ä. dürfte das künstliche Herz allerdings in absehbarer Zeit einsetzbar sein. Klar ist jedoch eines: Die technische Entwicklung ersetzt nicht gesunde Lebensweise und optimale Herzbehandlung. Es ist nicht möglich, gegen die Regeln der gesunden Lebensweise zu verstoßen und zu hoffen, daß die Auswirkungen dereinst durch ein künstliches Herz überwunden werden. Prophylaxe ist auch im Hinblick auf die Herzfunktion die beste Therapie.

(Aus: „Der menschliche Organismus"
von Dieter Künzel,
Verlag Volk und Gesundheit, 1983)

BONAN APETITON!

Receptaro de Sudbohemiaj manĝaĵoj. Kajero 2 — Fiŝaĵoj kaj Kajero 3 — Specialaĵoj. Eldonis: EK La Progreso en České Budějovice/ ČSSR, 1980/1983.

Estas kutime uzi Esperanton inter alie por propagandi sian hejmlandon aŭ regionon. Oni povas prezenti ne nur vidindaĵojn aŭ historiajn faktojn aŭ la nuntempan vivon, sed eĉ manĝaĵojn. La esperantistoj el České Budějovice konatigas al ni manĝaĵojn — specialaĵojn de sia regiono. La unua kajero temis pri supoj (vidu „der esperantist" n-ro 3/83). Kompreneble post supoj devas sekvi ankoraŭ io alia. Tial la du aliaj kajeroj prezentas al ni fiŝaĵojn kaj specailaĵojn.

Suda Bohemio estas regiono de fiŝlagoj. Ne miru, do ke fiŝaĵoj okupas gravan lokon inter la manĝaĵoj de tiu ĉi regiono. En 18 receptoj vi povas trastudi kiamaniere prepari karpon, tinkon, ezokon, sandron kaj aliajn fiŝojn. Gajaj ilustraĵoj akompanas ĉiujn receptojn.

Ankaŭ la 3-a kajero enhavas 18 receptojn. Ĉi-foje temas pri specialaĵoj, kiuj ŝajnas al mi tre allogaj, kaj mi estas scivolema, ĉu vi preferos Kastelajn bifsteketojn, Sudbohemian brasikaĵon, Pikilon de rabisto Burašek aŭ iun alian. Ŝajnas, ke bongustaj estas ĉiuj. La ilustraĵoj plaĉas al mi ankoraŭ pli ol en la dua kajero. Sed mankas klarigoj pri lokoj kaj personoj kiel ili estas troveblaj en la dua kajero. La legantoj certe ŝatus ekscii kiu aŭ kio estas Petr Vok, Šumava, Kaplice kaj aliaj.

La lingvo en ambaŭ kajeroj estas bona. Tamen oni povas rimarki, ke en la tria kajero respondecas aliaj personoj pri la lingvo. Mi rimarkis iujn ĉeĥajojn, ekz. knedlikoj aŭ glata faruno, kaj vane mi serĉis en vortaroj, kiuj fruktoj estas frandoj. Ankaŭ la ekstera aspekto de la lasta kajero malpliboniĝis. Mankas pli firma kovrilpaĝo kaj la paĝoj estas tre malbone tranĉitaj kaj binditaj.

Tamen mi jam ĝojas je la venonta kajero kaj estas scivolema per kiuj manĝaĵoj la sudbohemiaj esperantistoj surprizos nin.

Dieter Berndt

Laste aperis

— Bukedo, komp. Ĥristo Gorov. Dic. aŭtoroj. El la bulgara trad. diversaj. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1985. 78 p. Mimeo. 20 cm. Tridek tri poemoj kun temoj ligitaj al la postmilita historio de Bulgario.

— Diskriminacio; Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto, red. Renato Corsetti. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 175 p. 21 cm.
ISBN 92 9017 031 X. Dudek unu diversaj prelegoj kun antaŭparolo, komentoj kaj notoj pri multaj aspektoj de diskriminacio rasa, etna, kontraŭvirina, lingva ktp.; kun proponoj pri agado.

— Esperanto survoje/Esperanto unterwegs; Variaj kontribuoj/ Verschiedene Beiträge, red. Karl Beckmann k. a. Vieno: Aŭstria Esperanto-Instituto, 1984. 21 cm. Dulingva: Esperanto-germana. Kolekto de malsamspecaj tekstoj, kiuj vastasence prezentas Esperanton al neesperantista leganto, kun unupaĝa skizo de prononco kaj gramatiko.

— Esperanto: Einführungskurs, Karl Beckmann. Vieno: Österreichisches Esperantoinstitut, 1984. 87 p. 21 cm. Germanlingva lernolibro de Esperanto kun 22 lecionoj por memstudado, bazita sur gramatikmetoda pertelefona kurso.

— Facila skeĉ-albumo, Bertram Potts (1895). Chapecó: Fonto, 1984. 112 p. 21 cm. Fonto-Serio n-ro 3. Cent mallongaj skeĉoj por legado aŭ prezentado, taŭgaj por klasoj kaj klubversperoj.

— Forpasinto, La (1957)/Edvardo kaj Agripina, René de Obaldia (1918). El la franca trad. George Lagrange. Parizo: TESPA, 1984. 23 p. 21 cm. Du amuzaj teatrajetoj por malmultaj roluloj.

— Georgo Dandin; Komedio en tri aktoj (1667). Molière (ps. Jean Baptiste Poquelin, 1622 — 1673). El la franca trad. L. L. Zamenhof (1859 — 1917). Saarbrücken: Artur E .Iltis, 1984 (4a eld., represo el 1908). 51 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 2 Beletro tradukita 9. Unu el la klasikaj komedioj de la granda franca dramisto pri triangula amrilato.

— Gramatika ekzercaro de Esperanto, J. P. Bieliński. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1984. Mimeo. 21 cm. Morfologiaj kaj sintaksaj ekzercoj plus listo de gramatikaj terminoj kun pola traduko.

— Gvidlibro por esperantistaj ĉiĉeronoj kaj ekskursgvidantoj, Max Finkenzeller. Bydgoszcz: Monda Turismo, 1983. 15 p. Mimeo. 19 cm. Rekomendaro por estroj de turismaj grupoj.

— Homa voĉo, La (1929)/Bela indiferentulo, La (1939), Jean Cocteau (1889 — 1963). El la franca trad. Roger Bernard (1907). Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1984. 32 p. 21 cm. Speciala literatura n-ro de Franca esperantisto, n-ro 354. Du mallongaj teatrajoj de multflanka kaj pridisputita verkisto, konata pro sia novigo kaj eksperimentemo.

— Horizonto de Soveta Litovio; Sepa kajero, red. R. Šurkuté k. a. Vilnius: Mintis, 1984. 45 p. Ilus. Muziknotoj. Mimeo. 29 cm. Kolekto de diversspecaj tekstoj beletraj, sociaj, politikaj, Esperanto-movadaj.

— Istorija i sovremennoe sostojanie interlingvistiki; Interlinguistica Tartuensis 3, red. Paul Ariste (1905) k. a. Tartu: Tartuskij Gosudarstvennyj Universitet, 1984. 183 p. 22 cm. Sep traktaĵoj en la rusa kaj unu germana pri aspektoj de la historio kaj nuntempa stato de la interlingvistiko; kun resumoj en Esperanto, la germana aŭ franca.

— Language Awareness and the Place of Esperanto, Allan E. Nutton. Lodono: Esperanto Centre, 1984 (jaro neindikita). 4 p. 30 cm. Anglalingva inform-broŝuro pri la konsciiga rolo de Esperanto en la lernejo.

— Legu aktivulo 1 (1983) kaj 2, komp. J. P. Bieliński. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1984 (2a eld. de parto 1). 18 + 18 p. Mimeo. 21 cm. Bazaj informoj por novlernintoj pri la historio kaj evoluo de Esperanto kaj ĝia movado.

— Monda Komunika Jaro: Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado. Rotterdam: UEA, 1984. 11 p. 21 cm. Esperanto-dokumento 19 E. Du prelegoj el la 68a Universala Kongreso: „Monda Komunika Jaro kaj malŝlosiloj al komunikado" de Richard E. Butler (ĝen. sek. de Internacia Teiekomunika Unio) kaj „Sen lingva interkompreniĝo la maŝinaro estos senpova" de Humphrey Tonkin.

— Muminvalo; Rakontoj (1963), Tove Jansson. El la sveda trad. Eckhard Bick. Bonn: Esperanto-Junularo, 1984. 118 p. Ilus. Mimeo. 21 cm. Ne nur por infanoj, la aventuroj el la fantazia mondo de Muminvalo de jardekoj furoras sur la skandinava infanlibra kaj bildstria merkato; kun glosaro.

— Obsedo; Poemaro, Karolo Piĉ (1920). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 144 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 1 Beletro originala 6. Emocia poemaro aranĝita laŭ la sezona ciklo de la jaro, kun postparolo kaj glosaro.

— Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko 1984, div. aŭtoroj. Brno: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1984. 175 p. Tabeloj. Mimeo. 29 cm. La 21 prelegoj pri perspektivoj de la monda nutraj-produktado kaj problemoj de la fakaj lingvajo kaj tradukado el internacia seminario en Brno (31 aŭg. — 2 sept. 1984).

— Budeko al vi; Mikronoveloj, div. aŭtoroj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto Eldonejo, 1984. 95 p. Ilus. 18 cm. Dudek kvar noveletoj el la ĉina gazetaro pri la ĉiutaga vivo de ordinaraj ĉinoj.

— Dek ses urboj de Ĉinio. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 176 p. Ilus. 19 cm. Ampleksaj priskriboj de la ĉefaj urboj de Ĉinio, kun koloraj kaj nigra-blankaj fotoj.

— Kokido venĝis sian panjon, komp. Ĝan Tong. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 20 p. Kolorilus. de la kompilinto. 21 cm. Fabeloj de Ĉinio. Mjaŭa fabelo reverkita por infanoj, kun grandaj kolorbildoj.

— Kvin noveloj, Friedebert Tuglas (1886 — 1971). El la estona trad. (1924) Henrik Seppik. Tallinn: Eesti Raamat, 1984)2a eld.). 127 p. Ilus. de Ivi Raudsepp. 17 cm. Verkoj el la jaroj 1914 — 1925 de korifeo de la estona novelarto, karakterizaj pro arta kompakteco kaj perfekteco de la formo; kun antaŭparolo de August Eelmäe.

— Lutro kaj bufo, komp. Ĝan Tong. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 20 p. Kolorilus. de la kompilinto. 21 cm. Fabeloj de Ĉinio. Jia fabelo „Lutro kaj bufo", kaj dahura fabelo, „Abeloj kaj apro", reverkitaj por infanoj, kun grandaj kolorbildoj.

— Magia ŝipo; Ĉinaj popolaj rakontoj. El la Ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 75 p. Ilus. 18 cm. Ses fabeloj de la plej granda nacio en Ĉinio, la hanoj.

— Mia vivo, div. aŭtoroj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 127 p. Ilus. 19 cm. Dudek personaj rakontoj pri la vivo de tre diversaj ĉinaj civitanoj.

— Montara vilaĝo (1974), Chun-Chan Yeh (Ye Junjian/Cicio Mar). El la angla trad. William Auld (1924). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 264 p. 22 cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento n-ro 21. Historia romano, jam tradukita en multajn lingvojn, pri la okazajoj en vilaĝo dum la ĉina revolucio de 1927, de konata aŭtoro kaj tradukisto, kiu verkas ankaŭ Esperante.

— Ne nur leteroj de plum-amikoj; Esperanta literaturo — fenomeno unika, Marjorie Boulton (1924). Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1984. 63 p. 20 cm.
ISBN 91 85288 06 3. Malpeza enkonduka verko pri aspektoj de la Esperanta literaturo: la Esperanta verkisto, poezio, prozo fikcia kaj nefikcia, dramo, tradukoj, konsiloj al komencantoj; nacilingven tradukinda.

— Papilia fonto; Ĉinaj popolaj rakontoj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 67 p. Ilus. 18 cm. Unu baja, unu ujgura, unu taja kaj du ĝúangaj fabeloj.

— Petolema kaprido, komp. Ĝan Tong. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 20 p. Kolorilus. de la kompilinto. 21 cm. Fabeloj de Ĉinio. Mongola fabelo, „Petolema kaprido", kaj taja fabelo, „Soriko kaj cervo", reverkitaj por infanoj, kun grandaj kolorbildoj.

— Plena vortaro Esperanta-ĉina/Shijieyu-Zhongwen Dacidian, Feng Wenluo. Pekino: Zhongguo Shijieyu Chubanshe, 1984. 4 + 915 + 8 p. 16 cm. Bind. Unudirekta vortaro kun prok. 15 mil serĉvortoj, kun mallongigoj.

— Rozmówki esperanckie, Andrzej Pettyn (1937). Varsovio: Polski Związek Esperantystów, 1985. 247 p. 14 cm.
ISBN 83 7013 0100. Ampleksa laŭtema frazaro pola-Esperanta, kun afiksaro, mallongigoj kaj gramatika skizo.

— Senmortigaj fruktoj, komp. Mej Jing. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 64 p. Kolorilus. de la kompilinto. 18 cm. Bildrakonto por infanoj, laŭ filmo pri la mitologia romano Pilgrimado al la Okcidento (Wu Cheng-en, 16a jc).

— Serĉi panjon, adaptita de Han Xing. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 25 p. Kolorilus. de Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. 17 cm. Bildrakonto pri kortobirdoj, por tre junaj infanoj.

— Kio estas USSR? El la rusa trad. D. Perevalov kaj M. Lineckij. Moskvo: Novosti (APN), 1984. Duflanka faldfolio. Kolorilus. 66 x 45 cm. Bela plenkolora informilo pri diversaj sociaj aspektoj de Soveta Unio, inkluzive de la Esperanto-movado.

— Mapo de la ĉina Popola Respubliko. Pekino: Kartografia Eldonejo, 1984. Duflanka faldfolio 77 x 54 cm. Profesie produktita multkolora mapo kun esperantigita (neoficiala) transskribo de nomoj kaj trikolumna indekso (esperantigita, oficiala, ideografiaja) malantaŭe; en tenilo el plastigita papero.

— Albumo pri Ĉinio. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 96 p. Kolorilus. Mapo. 25 cm. 85-Es-175P. Plenkolora bildlibro, montranta multajn aspektojn de la lando kaj vivo de Ĉinio.

— Bonkora Ŝjaudon, Mej Jing. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 65 p. Kolorilus. de la kompilinto. 21 cm. 88-Es-204P. Bildfabelo por infanoj.

— Datumbazoj, red. Péter Broczkó kaj Ilona Koutny. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio/Scienca Eldona Centro de UEA, 1984. 64 p. Ilus. 24 cm. N-ro 3 de Internacia komputado. ISBN 963 571 136 0. Dudek unu popularaj artikoloj pri komputilaj datumbazoj; kun mallongaj novajoj kaj listo de novaj eldonajoj.

— Elprovado de l' amo. Antun Šimunić (1948). El la kroata trad. Lucija Borčić. Osijek: Esperanto-Societo „Liberiga Stelo", 1984. 18 p. Ilus. de V. V. Džanko. 21 cm. Dialoga poemaro de kroata poeto, kiu verkas ankaŭ Esperante.

— En novan mondon; Rektmetoda kurso por geknaboj, Vilma S. Eichholz. Bailieboro (Kanado): Esperanto Press, 1984. 384 + 74 p. Ilus. 21 cm. ISBN 0 919186 17 3/21 1. Sepkajera kurso kun rakontoj, teatrajoj, ludoj ks., plus Esperanto-angla vortareto.

— Feliĉa birdo, La; Ĉinaj popolaj rakontoj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 49 p. Ilus. 18 cm. 10-Es-1866P. La tria libreto de popolrakontoj el Ĉinio.

— Język międzynarodowy (1887), Doktoro Esperanto (pseŭd. de L. L. Zamenhof, 1859 — 1917). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1984. 40 + 2 p. 20 cm.
ISBN 83 7013 004 6. Fotorepreso de la unua lernolibro de Esperanto por poloj.

— Kolorigu, div. kompilintoj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 108 p. Kolorilus. 21 cm. 88-Es-204P. Ses parte koloraj kajeroj pri bestoj kaj floroj kune en skatolo, por kolorigo fare de infanoj.

— Mondo de Tibor Sekelj, La, red. Tibor Sekelj (1912). Subotica (Jugoslavio): Eldona Sekcio de EES, 1983. ĉ 250 p. (nenumeritaj). Lignogravuris Anduskó Károly. 5 cm. Bind. Kvin aparte binditaj miniaturaj kolektoj de lignogravurajoj pri Afriko, Ameriko, Azio, Eŭropo kaj Oceanio, kun enkonduko de T. Sekelj.

— Poeto ne mortas. František Kožik (1909). El la ĉeha trad. Jiři Karen. Prago: Ĉeha Esperanto-Asocio, 1984. 31 p. Ilus. 21 cm. Antologio el la verkaro de fekunda, multflanka verkisto kaj esperantisto; kun biografio.
— Pri literatura kritiko, Fernando de Diego. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 70 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 11. Sekcioj: Pri la alta kritiko, La kritiko super la lingvo, Nia recenza kritiko. La kritiko super la instrumentoj de la lingvo kaj pri la ideologio de Esperanto; kun antaŭparolo de Karolo Pič.
— Retoj, red. Péter Broczkó kaj Ilona Koutny. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio/Scienca Eldona Centro de UEA, 1984. 64 p. Ilus. 24 cm. N-ro 1 de Internacia komputado. ISBN 963 571 -34 4. Dudek popularaj artikoloj pri komputilaj informretoj sub sekcioj Teknika bazo, Komputilo kaj homo kaj Mikrokomputiloj; kun mallongaj novaĵoj kaj listo de novaj eldonaĵoj.
— Slownik esperancko-polski, Andrzej Pettyn (1937). Varsovio: Polski Związek Esperantystów, 1984. 172 p. Mimeo. 20 cm. ISBN 83 7013 000 3. Vortaro de ĉ. 5 mil serĉvortoj kun plej ofte unuvortaj ekvivalentoj; tabeloj de afiksoj kaj mallongigoj.
— Suferoj de la juna Werther, La (1774), Johann W. von Goethe (1749 — 1832). El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Heckendalheim: Eld. Berthold Faber, 1984, 92 p. Ilus. 22 cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento n-ro 19. ISBN 3 923 228 99 6. Tipo de la sentimentala romano, verkita en formo de leteroj, per kiu Goethe akiris internacian famon, aparte inter la tiutempa junularo; antaŭparolo de Baldur Ragnarsson; inda grafika prezento.
— Teksto-prilaboro, red. Péter Broczkó kaj Ilona Koutny. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio/Scienca Eldona Centro de UES, 1984. 64 p. Ilus. 24 cm. N-ro 2 de Internacia komputado. ISBN 963 571 135 2. Dudek ok popularaj artikoloj pri komputila tekstoprilaborado sub sekcioj Komputilo kaj homo, Maŝina tradukado kaj Mikrokomputiloj; kun mallongaj novajoj kaj listo de novaj eldonaĵoj.
— Vortaro de Esperanto (1911), Kabe (pseŭd. de Kazimierz Bein (1872 — 1959). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 175 p. 22 cm. Bind. La unua ampleksa Esperanta-Esperanta vortaro (kun ĉ. 5 mil artikoloj) kompilita de la plej granda stilisto de la unua periodo de la Esperanta literaturo.

Ŝota Rustaveli: Aforismoj. En Esperanto kaj georga (kartvela, gruzina). Tbiliso 1983 (Mecnierebla), 78 p.

Jus aperis en Sovetunio maldika sed rimarkinde libreto. Temas pri elekto de aforismoj el la granda poemo „Tigrofelulo" de la kartvela poeto Ŝota Rustaveli.
La poemon Rustaveli skribis inter 1198 — 1207. La aforismoj respegulas la mondkoncepton kaj karakterizas lin kiel humaniston de sia epoko. La esperantigon de la aforismoj ni dankas al Zurab Aleksandroviĉ Makaŝvili.

Jen malgranda elekto:

Sciu do: neniu plukis rozon sen pikantaj dornoj.
Sur amboso plumba oni rompas eĉ malmolan ŝtonon.
Parolado longa kurtas — jen valor' de poezio.
Se amikon vi ne serĉas, al mem vi malamikas.
Oni diras: En infero ankaŭ helpas koruptado!
Ĉiu estas la saĝulo dum batalo de alia. . . .
Sed ankaŭ fojfoje enestas tre trivialaj aforismoj:
Estas granda diferenco inter homoj sur la tero.
Post venkita malfacilo — tiam tre agrablas ĝojo.
Korpon kaj animon fuŝas la mensogo, hipokrito. . . .
Sed entute, originala kaj laŭdinda kontribuo.

D. B.

Rimarko de la redakcio:

De la tradukinto Zurab Makaŝvili ni ricevis jenajn informojn:
La eposo „La tigrofelulo (la kavaliro en la tigrofelo) estas tradukita komplete en la germanan. Unuajn provojn faris Bertha von Suttner. 1889 aperis la unua traduko de Arthur Leist en Dresden. Aliajn germanigojn faris Martin Remanes, Hermann Budensieg, Ruth Neukamm kaj Hugo Huppert. Entute la eposo estas tradukita en pli ol 60 lingvojn.
Zurab Makaŝvili (naskita 1922) tradukis esperanten la tutan eposon.

Afiŝo pri agrikulturo de GDR

La Agrikultura Ekspozicio de GDR en Leipzig-Markkleeberg unuafoje eldonos, komence de la 1986-a jaro, multkoloran faldeblan afiŝon en Esperanto-versio. Tiu ĉi afiŝo ekestis en kunlaboro kun leipzig-aj esperantistoj kaj estos senpage havebla. Jam nun eblas mendi la presaĵon. Post apero la dupaĝa afiŝo estos forsendata al la mendintoj. Uzon de la Lingvo Internacia por la mendoj eblas, ĉar esperantistoj prilaboros la mendilojn. La eldonkvanto ampleksos dumil ekzemplerojn, tial eblas ekpeti plurajn ekzemplerojn. Rekta mendo el eksterlandoj dezirata por montri la funkciadon de Esperanto al la eldonistoj! Uzu nepre tiun ĉi oferton, ĉar — kaze de multnombraj mendoj — oni pripensos eldonon de pluaj presaĵoj!
Mendu ĉe: „Landwirtschaftsausstellung der DDR (Agrikultura Ekspozicio de GDR), DDR — 7113 Markkleeberg, Raschwitzer Straße 11/13". Aldonu la kodvorton „Agrikulturo".

Al tutmonda amikaro!

Interinstituta junulara centro funkciata ĉe Domo de Junularo (MMC KDM) deziras korespondi kun ĉiu klubo aŭ persono. Niaj fakoj: 1. Filozofia, 2. Internacia, 3. Pedagogia, 4. Muzika, 5. Memedukada, 6. Sana (medicina), 7. Naturprotektada.
Niaj laborlingvoj: Esperanto, germana, rusa, angla, franca, japana, itala, bulgara. Ni ĉiam ĝojus pri novaj leterkontaktoj.

KORESPONDDEZIROJ 31 6 35

Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!

Ĉinio

Dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: s-ro Zhang Yi Qun, Yi Chuan San Cun 110 Hao 312 Shi, **Shangai** (23j.)

GDR

20j.-apotekistino dez. kor. tutmonde pri literaturo, historio, teatro: Simone Schubert, **9023 Karl-Marx-Stadt,** Hans-Sachs-Str. 22
Lisbeth Scheinert, **9090 Karl-Marx-Stadt,** Waldenburger Str. 58, (55j.), dez. kor. tutmonde pri historio, geografio, turismo, naturo, kulturo.
Komencantino, 18j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk: Jana Gebhardt, **4450 Gräfenhainichen,** Eisenbahnstr. 4
Komencantino, 54j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk: Rita Gebhardt, **4450 Gräfenhainichen,** Eisenbahnstr. 4
Heidrun Baumann, **2420 Grevesmühlen,** Wilhelm-Pieck-Ring 47, (22j.), dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.
Horst Hübner, **3271 Friedensau,** Nr. 8, (47j.), dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, fotografado k. a.

Hispanio

Instruistino pri muziko dez. kor. pri muzikinstruado en baza lernejo: Ana Lledó, avda. Gola del Puchol, 22-B-18a, El Saler, **46012 Valencia**

Kubo

Elektroteknikisto, radioamatoro, 36j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. poŝkalendarojn, bk: Edilberto Rodriguez Acán, Apartado no. 98, **Camagüey 1,** Provinz Camagüey

Pollando

Geknaboj, 12 k. 8j., dez. kor. kol. pm kaj librojn pri faŭno kaj floroj: Edyta k. Tomek Tomczak, Blowacka 23/4, **65-617 Zielona Gora**
Instruistino de germana lingvo ((25j.), dez. kor. pri lingvoscienco kaj turismo: Danuta Chrzanowska, ul. Lesna 41B, **87-800 Włocławek,**
Stanislaw Zalewski, Janowice 156, **43-332 Bestwina,** woj. Katowice, (33.) dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.,

Soveta Unio

Dez. kor.: Juknaite Džilda, **235 250 Pasvalys,** Konyaunimo 38
18jara studento, komencanto, dez. kor. tutmonde pri sporto, lingvoj, kol. pm: Kiril Batievskij, **220 050 Minsk 50,** K.-Marksa 20-6
Dez. kor.: Aili Petri, **202500 Valga,** Metsa 17-8, kol. bk, kalendarojn
36j. dipl. elektroinĝeniero dez. kor. pri radio, Tv, fotografado, arto, kol. bk, kalendaretojn, diskojn: Jurij Fedorov, pk 1580, **310 145 Harkov**
17j. studento dez. kor. pri turismo, muziko, E-movado, kol. bk, pm: Arunas Vaivada, **234 431 Skirsnemune,** Jurbarka raj.
24j. fratinoj dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Kim Suok, Kim Surani, **692 800 Artjom,** Primorskij kraj., ul. Frunze 54-205
Mihail Borisociĉ Lendler, **288 630 Vinnickaja oblast,** Barskij raj., pos. Kopajgorod, dez. kor.
Irina Dedkova, **410 056 Saratov,** str. Sovetskaja d. 72/82, 64 (20j.) dez. kor. pri historio de antikva mondo, pentrado, kino

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16